




## GENERALA PLANO KAJ ENHAVO.



**NUNTEMPAĴOJ** : Senfadenaj telegrafo kaj telefonio, de *Marcel Finot* (FRANCUJO).

**INFANA PAĜO** : Knabina vivado en Japanujo, de *C. Steenbuch* (JAPANUJO).

**DIVERSAĴOJ** : Vasiliso la Saĝega, rusa popola fabelo, tradukita de *Romano Frenkel* (SIBERUJO). — Io bona povas veni el Anglujo, de *F. L. G. Maréchal* (ANGLUJO).

**ĈIULANDA VIVADO** : Vilaĝana movado en Gurujo, de *D<sup>ro</sup> M. K.* (RUSUJO).

**VIRINA PAĜO** : La modo, de *Roksano*.

**LITERATURAJ PAĜOJ** : Gül Baba, Hungara legendo, de *Bela Toth kaj Altenbürger* (HUNGARUJO). — La vizitkartoj, de *Ernest d'Hervilly kaj J. Flourens* (FRANCUJO). — Nenia mono, nenia krimo, de *C. Classen* (U. S. A.) — « La Viska branĉo », angla kanto, de *E. J. C.* (ANGLUJO).

**FELIETONO** : Poŝta Amo, de *Johano Munoz kaj Pabon, kaj Johano Garcia Martin* (HISPANUJO).

**PRI ESPERANTO** : Kroniko kaj Bibliografio ; Kelkaj praktikaj aferoj.

**SPORTA PAĜO** : Tra la Sportoj, de *L. de Guesnet*.

**KOMERCO KAJ INDUSTRIO** : La Haveno La Rochelle, de *Sam. Meyer* (FRANCUJO).

## REDAKCIO kaj ADMINISTRACIO.

NUR miksaĵoj, t. e. : ludoj, amuzaĵoj, problemoj kaj solvoj, devas esti sendataj al S<sup>o</sup> Brunet, 9, Cours V. Hugo, Bordeaux, (Fr.)

Manuskriptoj, kaj mendoj KUN MONO, devas esti sendataj al :

**Gazeto « Tra la Mondo », Meudon (S. et O), France.**

Oni bonvolu sendi la monon poŝtmandate — Nur de landoj ne havantaj internaciajn mandatojn, aŭ por pago de specimenoj, ni akceptas poŝtmarkojn laŭ ilia efektiva valoro.

Jara abono : 8 fr. ĉiulande. (1<sup>a</sup> Jaro : 10 fr.) — Duona : 4.50 fr. — Kvarona : 2.25 fr. — Unu kajero : 75 c.

**RIPREZENTANTOJ** : Brita Imperio : British Esperanto Asocio, 13, Arundel Street, Strand, London, W. C.  
Svedujo : S<sup>ro</sup> P. Ahlberg, 37, Surbrunnsgatan, Stockholm.

« TRA LA MONDO » estas aĉetebla ponumere ĉe la Librairie de l'Esperanto, 46, Rue S<sup>te</sup> Anne, Paris.



## Premio al niaj legantoj.

Por esti agrablaj al niaj legantoj kaj samideanoj, ni klopodadis kaj faris interkonsenton ebligantan liverigi, *hejmen* kaj sen transportkosto en ĉiun Eŭropan landon (Transmare, eksteren transporto plue), je la malgranda prezo montrata ĉi sube, la precizegan poŝhorloĝon L'ESPERO, kiu eliras el unu el la plej bonaj svisaj fabrikejoj, kaj kies ujo, el blanka metalo oksidita kvazaŭ malnova arĝento, estas fotografe montrata ĉi apude.

En la du kvalitatoj, la poŝhorloĝo estas plene garantiata, bonege reguligita, radaro je ankro perfektigita, eleganta formo. La sendo estas farata kontraŭ poŝta repago aŭ antaŭa pago, laŭ peto sendita al la administracio de « Tra la Mondo ».

Unua kvalitato : 30 fr. Dua kvalitato : 20 fr.

## Novjaraj deziroj.

La ĵus finiĝanta jaro alportis al nia afero pleje kuraĝigantajn rezultatojn. La fruktoj de niaj du unuaj kongresoj povis jam esti kolektataj en kelkaj lokoj kaj ni vidis, aparte, Esperanton fortikiĝantan en U. S. de A., kie ĝi estis apenaŭ konata la antaŭan jaron.

Esperoj estas do permesitaj, sed multe ankoraŭ ni bezonas tamen labori. La 3<sup>a</sup> Kongreso devas esti nia senpera celo.

Al vi ĉiuj amikoj, gelegantoj, korespondantoj, kunfratoj, niajn plej korajn dezirojn por via estonta laborado, por la sukceso de viaj penadoj dum la jaro kies aŭroro eklumis.

« TRA LA MONDO »

### Artikoloj favoraj por « Tra la Mondo ».

Nia artikolo pri la esperantista movado en Skotlando altiris favore la atenton de kelkaj skotaj ĵurnaloj, inter kiuj « The Evening Times » kaj « The Bailie » el Glasgow, « Stirling Sentinel » el Stirling, kiuj plezure konstatis, per nia revuo, la progresojn de Esperanto. Laŭ « Stirling Sentinel », ĝi estas « ĉarmplena miksaĵo por Esperantistoj el la tuta mondo ». Ni tre dankas nian amikon G. Douglas Buchanan, kiu diskonigis nian artikolon, kompreninte ke ĝi kaj la gazeto estas bonegaj helpoj por niaj skotaj samideanoj.

Tre favora artikolo, ankaŭ, en la « Revue du Touring Club de France » en « La Métropole » d'Anvers, en « Le Cycliste », « Le Journal de Beanne ».

Bonegaj artikoloj por Esperanto en « Le Petit Hâvre » pri la sukcesinta parolado de S<sup>o</sup> L. de Beaufront, la sindona Prez<sup>o</sup> de l' S. f. p. E., kiu ageme agas por nia afero. Unu el la artikoloj enhavas la portreteton de S<sup>o</sup> de Beaufront, fakto atentinda ; sed kiom ni estas malproksimaj de l' grandaj paĝoj ilustritaj pri Esperanto de kelkaj amerikaj ĵurnaloj!

### Naskiĝintaj revuoj.

« Paris-Esperanto », monata bulteno de l' esp. grupo de Paris. La 1-2<sup>a</sup> kajero enhavas nomaron de ĉirkaŭe 50 kursoj pri Esperanto en Paris kaj ĉirkaŭaĵo. La 3<sup>a</sup> kajero plenigas la nomaron kaj sciigas, ke 2 kursoj pri Esperanto havas lokon en la programo de l' liceo Michelet. La profesoro estas nia konata samideano, D<sup>ro</sup> Vallienne.

### Malaperanta revuo.

« Esperanta Studento » definitive ne plu aperos. Kun koke-teco vere virina, la redaktorino, F<sup>ino</sup> Oxenford nia ĉarma kunlaborantino, finigas sian verkon per ampleksa kaj tute interesa numero.

Kun granda simpatio ni salutis l' aperon de tiu bonega revueto, kiu havis kaj konservis sian specialan ĉarmon ; kun vera malĝojo ni vidas ĝin morti — ne pro malsukceso, sed ĉar la redaktorino ne plu povas elporti la pezan ŝarĝon de la redaktado, direkciado kaj presado de la gazeto.

Al ŝi niajn sincerajn dankojn pro la penadoj faritaj por Esperanto.

A. M.

Ne ne akceptas la respondecon de l' abonaj numeroj de « Tra la Mondo » perditaj de la poŝto. — Ni faras la adresŝanĝojn NUR laŭ peto AKOMPANATA DE 50 CENTIMOJ.

La manuskriptoj ne estas resendataj.

Oni povas represi niajn artikolojn kiam malpermeso ne estas speciale farita, sed oni estas petata ĈIAM CITI LA DEVENON DE l' ARTIKOLO, t. e. la nomo « Tra la Mondo », kaj sendi al ni ekzempleron de la traduko.

Ni respondas nur al la leteroj akompanataj de la respondeca poŝtmarko.

## NIA PROJEKTITA VENONTA NUMERO.

Tertremoj, de *Amfiteatrov* (Rusujo), trad. de Leo Belmont (Polujo). — La knabina vivado en Japanujo, de *C. Steenbuch* (Japanujo). — Kroniko scienca, de *M. Finot* (Francujo). — La piloloj de D<sup>ro</sup> Kohol, originala fantaziaĵo., de *Hans Romanoviĉ* (Aŭstrujo). — Virina paĝo (Modo), de *Roksano*. — K. a. — Nuntempaĵoj. — Militistaro kaj Maristaro. — Maroka krueleco, de *E. Bacquet*. — Esperanta kroniko. — Miksaĵoj.

FRANÇOIS COPPEE

# Unua Ĉapitro

de miaj memorskriboj

ESPERANTIGITA DE  
AUGUSTE MONDROSIER



PRIZO : 75 CENTIMOJ

PARIS  
ALPHONSE LEMERRE, ELDONISTO  
21-23, PASSAGE CHOISEUL, 21-23  
M. DCCCLV

Ĉarma verketo de l' fama franca akademiano,  
kun antaŭparolo tute aproba por Esperanto.

Ĉe « Tra la Mondo ».



## LA MIÉLINE GELSON

MIRINDA REMEDO KONTRAŬ

### La falo de l' Haroj

Ĉe ĉiuj bonaj kombistoj kaj ĉe

FERRÉ, BLOTTIÈRE & C<sup>ie</sup>,  
102, rue de Richelieu, PARIS.

## “ Esperantine ”

BONEGA DIGESTIVA LIKORO

Ĝenerala vendejo por Francujo kaj alilandoj :  
BRUNON-GHAUVET, Saint-Etienne (France).

### Esperantaj ŝlosiloj.

Mirindaj broŝuretoj ne pezaj (5 gramojn),  
enhavantaj regulojn de Esperanto kaj « vortaron  
ebligantan tuj kaj senprezare deĉifri kaj legi  
ĉion esperante skribitan » Enmetebaj en leteron  
sen pliigo de la poŝtkosto

Jam estas pretaj la angla, germana, franca,  
ilala, sveda, hispana eldonoj kaj riceveblaj po

**3,50 frankoj la centon (100).**

Tre rekomendindaj por la propagando. Ĉi-  
landaj poŝtsignoj estas akceptataj laŭ la  
efektiva valoro.

### Sinjorinoj !

Se vi volas ne plu suferi je la monataj  
sangefluoj aŭ je la epoko de ilia mal-  
apero, ensorbu la

#### DRAGÉES BLOTTIÈRE

sendanĝeran produktajon, bombonfor-  
man, kiu tuj kaj certe forigos la doloron.  
Por havigi la Dragées Blottière, sendu  
2,25fr. poŝt-aŭ kartmandate, 102, Rue  
Richelieu, PARIS.

## L'Internacia Signo

estas la « VERDA STELO » Gasse

MARKO REGISTRITA

fr. 1 por unu; fr. 9 por 12; fr. 45 por 100 (por  
kunmona mendo). Ĉe S<sup>ro</sup> Emilo Gasse, 10  
rue du Lycée, Le Havre (France).

## SE

vi konas malfacile spiranton (astmema-  
ulon), vi faros al li servon koniganta  
la « Remède d'Abyssinie Exibard »  
(Abisinia kuracilo EKSIBAR), pudro  
cigarede, aŭ je formo de folioj por  
fumi kvazaŭ tabakon en la pipo. Tio  
kuracilo, ordonata de ĉiuj kuracistoj,  
sensuferigas kaj resanigas milojn da  
malsanuloj ĉiujare. Sin turni al

Sinjoroj H. Ferré, Blottière et C<sup>ie</sup>  
102, rue de Richelieu, PARIS.

LA INTERNACIA TRINKAĴO !

## Viskio Esperanto

Registered trade mark N° 270,042.  
Marque déposée N° 13,195  
Registered Label No 272,434

Bonvolu observi la verdan stelon kaj la  
nomon **ESPERANTO** sur la afiŝeto, kiu estas  
desegnita kiel propagandilo.

## Buchanan, Scott & C<sup>o</sup>

GARTHLAND STREET,

GLASGOW (Skotlando).

Telegrafa adreso : Esperanto - Glasgow.

## Tra Oberland Berna

ILUSTRITA GVIDLIBRETO

de TH. HOPF, Apotekisto, Adelboden

aĉetebla ĉe OSCAR HOPF, Thun

svisa esperanta eldonejo.

(Prezo 50 centimoj).

## ANGLA-ESPERANTA LERNEJO POR KNABINOJ.

Tutjarloĝantinoj. Fraŭlino EVERDELL L.L.A.

College House, Bridgwater, Somerset, Anglujo

— Korespondas Esperante. —

## Campanvino “Mirinda”

Sciigojn ĉe S<sup>ro</sup> Ch. JADEAU

en MERCUREY (S. & L.) FRANCE.

## FERVOJOJ de PARIS-LYON-MÉDITERRANÉE

De Paris Orienten (tra Marseille).

La K<sup>io</sup> P. L. M., konsentinte kun la K<sup>io</sup>j Messageries Maritimes, Fraissinet kaj Paquet,  
liveras biletojn simplajn (irajn), uzeblajn dum 45 tagoj, por veturi, tra Marseille, de Paris  
ĝis unu ajn el la sekvantaj havenoj : Alexandrie, Beyrouth, Constantinople, Le Pirée,  
Smyrne, Alexandrie, Jaffa, Port-Saïd, Batoum, Salonique, Odessa, Samsoun, k. t. p.

La oficejoj de la K<sup>io</sup> Messageries-Maritimes liveras biletojn irajn kaj reirajn uzeblajn  
120 tagojn por veturi, tra Marseille, de Paris ĝis Alexandrie, Port-Saïd, Jaffa, Beyrouth.  
Haltoj laŭvolaj laŭ la vojaro P. L. M. (per Bourgogne aŭ Bourbonnais).

Tiuj biletoj donas rajton je senpaga transporto ĝis 30 kg. da pakaĵoj por ĉiu vojaĝ-  
anto sur la vagonaro; sur la ŝipoj, tiu senpageco altiĝas ĝis 100 kg. por 1<sup>a</sup> klasa  
loko kaj 60 kg. 2<sup>a</sup> klase.

Por pluj sciigoj, legu la Gvidlibron-Horaron P. L. M., aĉeteblan 50 centimojn en la  
stacidomoj de la K<sup>io</sup>.

VINTRO 1906-1907

## RILATOJ inter PARIS kaj HISPANUJO

per la luksa vagonaro « Barcelone-Ekspres » (V.-L.-R.)

— NOMBRO DE LOKOJ LIMIGITA —

Deiro de Paris : Merkrede, Sabate je 7 h. 30 vespere.

Deiro de Barcelone : Lunde, Vendrede je 1 h. 50 vespere (H. E. O.)

Rim : Tiu vagonaro iros baldaŭ ĝis Valencia (Hispanujo).

# MIKSAĴOJ.

## KONKURSOJ KAJ PREMIOJ.

### Solvoj de l' problemoj (4<sup>a</sup> kvaronjaro).

PROBLEMO 41<sup>a</sup> MAJ — oro = majoro.

PROBLEMO 42<sup>a</sup> buklo — buklo.

PROBLEMO 43<sup>a</sup> paĝo — ago.

PROBLEMO 44<sup>a</sup> kal' — kan' = kalkan'.

PROBLEMO 45<sup>a</sup> G A R O L O  
A P E R I  
R E T O  
O R O  
L I  
O

PROBLEMO 46<sup>a</sup> flav' vafll'

PROBLEMO 47<sup>a</sup> A K R I D O  
K I A L O  
R A P O  
I L O  
D O  
O

PROBLEMO 48<sup>a</sup> PORELO. ORELO. RELO.

PROBLEMO 49<sup>a</sup> MID EZI RAS ALV IBO NAN  
ŜAN CON

PROBLEMO 50<sup>a</sup> apostolo.

PROBLEMO 51<sup>a</sup> barbo barko barĉo.

PROBLEMO 52<sup>a</sup> lupo ludo.


PROBLEMO 53<sup>a</sup> MIA PATRO.

PROBLEMO 54<sup>a</sup> INSULO BANDO SERUROJ.

PROBLEMO 55<sup>a</sup> (ne aperis.)

PROBLEMO 56<sup>a</sup>

Tondu la rektangulon laŭ la 3 senintermankaj linioj; faldu ĉiun grandan rektangulon laŭ la mezalinio kaj metu la du punktajn liniojn unu sur la alian. Vi ricevos 4 malgrandajn kvadratojn kiuj, taŭge apudmetitaj, liveras la ĉi suban kliŝaĵon.



DIVENIS (la ciferoj metitaj post la nomoj rilatas la numerojn de la solvitaj problemoj.

Letenneur	41	42	43	44	45	46	47	48	49	50	51	53	54	
Warden	41	42	43	44	45	46	47	48	49		51	53	54	56
Rigoir	41	42	43	44	45	46		48			51	53	54	
L. Holt			43	45	46	47	48	49	50	51		53	54	
Devoucoux	41	42	43	44	45	46		48			51	53	54	
F <sup>no</sup> Allin	41	42	43	44	45		47	48				52	54	56
Sinjinoro Br	41	42	43	44	45	46								<i>ne plene</i>
Karulino	41	42	43	44	45	46								54
Bacquet	41		43	45										
Bastoul			43	45	46		48					52	53	

### Klasigo por la 4<sup>a</sup> kvaronjara kaj premioj.

Post lotmontrado inter la gedivenintoj laŭ la kvanto da problemoj diyenitaj de ili.

Letenneur gajnis 5 frankojn mone

Warden gajnis 4 kvaronjarajn abonojn al « Tra la Mondo »

L. Holt gajnis 2 samajn ab., sendebajn laŭ ilia deziro.

Tiuj gedivenintoj estas petataj diri al mi kion mi devas fari per aŭ pri la gajnaĵoj. (La sekvo pli poste).

## Esperanto ĉe la Junularo.

La dua kongreso ne forgesis la junularon, kiu, laŭ la ĝenerala opinio, estas la estonto de Esperanto. Tial, merkredon 29<sup>an</sup> de Augusto, je la kvina, okazis kunveno privata de la esperantistaj profesoroj, instruistoj kaj edukistoj, kunvokitaj je la iniciato de la tre konata Rektoro Boirac. Proksimume cent geedukistoj ĉeestis kaj laboradis kun la plej granda intereso. Jen estas la resumo de tiu ĉi gravega afero.

Post parolado tute preciza kaj logika de Rektoro Boirac, oni decidis la jenajn punktojn:

1<sup>o</sup> La edukistaro ne deziras naski novan societon kun regularo, kotizaĵoj, estraro k. t. p., sed nur unuigi la agadon, la penojn de ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la enkonduko de Esperanto en la programojn de la publika instruado.

2<sup>o</sup> Por atingi la celon, necese estis komenci per la komenco, tio estas kalkuli la veran nombron de la veraj esperantistoj ĉe la diversaj edukejoj (1). Tial la kunveno elektis 16 agemajn delegitojn (unu po ĉiu Akademia regiono), kiuj ricevos la necesajn sciigojn el ĉiu Departemento kaj el ĉiu diversgrada lernejo. La delegitoj sendos la tuton al la *Centra Oficejo* en Parizo, por S<sup>ro</sup> Boirac. Tiamaniere, oni havos rapide plenan statistikon, kiu ebligos juĝi la nunan potencon de Esperanto ĉe la Franca edukistaro; kiu ebligos ekvidi la malfortajn lokojn kaj fari tie fruktodonan propagandon.

3<sup>o</sup> Poste, la laborado longe daŭros, sed ĉiam metode. Ekzemple, oni povos grandigi la unuigon kaj organizi la internacian unuigon de la edukistaro.

Sed iom post iom, ni sciigos la rezultatojn al nia legantaro. Fine, tiu ĉi bonega agado, ni estas konvinkataj pri tio, helpos fortege sublevi la kurtenon, kiu ĝis nun kaŝis la mondon al la kuriozaj okuloj de la junularo.

EDUKISTO.

La profesoroj kaj prezidantoj de esperantistaj lernantaj organizitaj grupetoj en liceoj, gimnazioj kaj ĉiuspecaj lernejoj, estas petataj bonvoli sendi la fotografiaĵojn de tiuj grupoj, tiom kiom eble formato 9/12, kun klarigoj, detaloj... al S<sup>ro</sup> Bord en Beaune, korespondanto de « Tra la Mondo » kaj prezidanto de la organizita grupeto « Verda Stelo » en Beaune.

Belegaj propagandaj poŝtarkoj kun vidaĵoj de Algerio;  
Tra, arankite, ĉin deklino.  
Propagandaj poŝtarkoj de « Tra la Mondo »  
fr. 1,50 ĉiu centro.  
ĈE « TRA LA MONDO »

MILKA  
VELMA  
NOISETTINE

Suchard

LA BONGUSTEGAJ  
ĈOKOLADOJ  
POR MANMANĜI.

La loka Estraro de Edukado en Heywood (Britujo) konsentis, laŭ la peto de l' grupestraro esperantista, ke oni malfermu kurson Esperantan. En St Helens, petskribo subskribita de tridek gravaj urbanoj al la urba komitato pri Edukado, por la sama celo.

En London, 4 kursoj el 8 estas aprobitaj de County Council (Urbestraro).

En Dover, la Edukada Komitato daŭrigis prunton de ĉambrego en la Urba Lernejo. Ankaŭ en Burnley.

Dum kunveno de la grava societo « Educational Institute of Skotland », en la Universitato de Edinburgh, oni multe parolis, dutage, pri Esperanto, kaj oni vendis pli ol 500 librojn. (*The British Esperantist*).

En Germanujo ankaŭ estas citeblaj faktoj montrantaj sukceson ĉe la edukistaro: parolado de S<sup>ro</sup> Rudolf el Reichenberg en Haida antaŭ 90 profesoroj, instruistoj k. a.; kurso komencita de S<sup>ro</sup> Jenish en la supra lernejo por instruistoj de Wien (*Germana Esperantisto*).

(Vidu la sekvantan kovrilan paĝon).

(1) Malnova kaj neplena statistiko kalkulis proksimume mil esperantistajn edukistojn.

# NUNTEMPAĴOJ

## Telegrafio kaj Telefonio senfadenaj.

Malgraŭ la ofta ripetado de sciigoj memorigantaj tiun novan rimedon de interkomunikado, dum ankoraŭ longa tempo, oni malfacile ĝin kutimos; oni tiel pensas pri la depeŝoj sur fadenoj alpeŝigitaj laŭlonge la fervojojn, ke ŝajnas stranga la forigo de tiuj metalaj komunikiloj. Ni konas precipe la fajrerojn elektran per ĝia bruo kaj lumo, sed interne de ĝi loĝas ankoraŭ tria elemento, silenta kaj grava, kiu konsistas el tre rapida elektra oscilado. La fajrero estas vibranta materio trairanta la malplenaĵon, la aeron, la puran akvon, kaj haltigita de metalaj ŝirmiloj kaj sala akvo; ĝi vojaĝas je la grandega rapidiro de la lumo. Tiujn vibradojn ni ne sentas tial ke ni ne havas taŭgan organon, kiel oreilon por sono, okulon por lumo. Estis do necese ke oni eltrovu en laborejo elektran okulon, por ke tiuj vibradoj estu al ni montritaj kaj utiligataj en telegrafio senfadena.

La plej ordinare konata ricevorgano estas tubo enhavanta fererojn; ĝi konsistas el preneto da metaleroj metita inter du transigaj baretoj. Kiam oni ĝin lokas en la ĉirkaŭon de elektra pilo kun telegrafia Morsa ricevilo, la fluo de la pilo estas interrompita; sed se fajrero elektra krevas ialoke, eĉ malproksime, la baraĵo kontraŭmetita al la pilo estas tuj rompita, la fluo de la pilo trairas kaj la Morsa ricevilo enskribas punkton. La kontaktpaletro estas tiel aranĝita, ke per sia transloko, ĝi puŝas la metalertubon; pro speciala propreco de la fereroj, la puŝo okazigas ke la rondiro de la pilo estas tuj denove interrompita. Nova fajrero kaŭzas enskribon de nova signalo, k. t. p.; sekvado de signaloj donas la depeŝon.

Oni naskas la produkton de fajreroj, ĉe la elsendloko, apogante sur manipulilo, kiel en ordinara telegrafio. La du lokoj povas esti malproksimaj je 50 aŭ 100 km; sur maro ĝis 500 km. Oni tiel trovis rimedon, ĝis nun neblan, por interkomunikigi vojaĝantajn ŝipojn kaj ĉesigi ilian izolecon.


Tuj kiam fajrero krevas ĉe ia sendloko, ĉiuj ricevlokoj ne tre malproksimaj ricevas la signalon, kaj unu sendloko radiellasas sur multe da aparatoj. Tiel sendaparato lokita en la mezo de granda lando, povus sendi je diritaj horoj la novaĵojn al centoj da ricevlokoj. Tiu ĉi disvastigo, sendube tre utila, estas ofte maldiskreta, ekzemple dum bataladtempo. Por havi sekreton de depeŝoj, estos necese ke oni laboradu por provi akordon inter ia sendloko kaj ia ricevloko, elpelante ĉiujn aliajn. S<sup>ro</sup> Marconi certigas ke li ektrovis la solvon de la problemo, kaj ke li povas sendi radiojn nur al direktoj laŭvole montritaj. La eksperimentoj faritaj en Anglujo estas sufiĉe bonaj.

La progresoj de la senfadena telegrafio estas do tre gravaj; bedaŭrinde, ĝis hodiaŭ, la nacioj ne estis povintaj interkonsenti pri la rimedo de interkomunikado: la aparatoj estis malsamaj kaj la diversaj kompanioj ne volis akcepti la telegramojn devenantajn de la aliaj.

Pri tio okazis, dum monato Oktobro, granda konferenco en

Berlin, kiu ĉeestis delegitoj el 30 nacioj. Tiu konferenco ĵus finiĝis kaj triumfigis la principon de la internacieco kaj de la interkomunikado de ĉiuj sistemoj, malgraŭ la momentaj esceptoj de Italujo kaj Anglujo, pro la traktatoj, kiuj estis faritaj inter ili kaj la kompanio Marconi. La registaroj metos novajn aparatojn en ĉiujn regionojn, kie tiu kompanio ne akceptos la interkonsenton. Ĉiuj nacioj devos akcepti la depeŝojn senditajn de ŝipoj al bordoj, kaj reciproke. La interkonsento estos valora de la 1<sup>a</sup> januaro 1908.

Ni do esperu ke baldaŭ la interkomunikado per senfadena telegrafio estos tiel facila, kiel la ordinara telegrafio.



SINJORO MAICHE EKSPERIMENTANTA EN SIA ĜARDENO.

\*\*\*

Post tiu bela eltrovo, oni jam de longe laboris pri la senfadena telefonio. Ni estas feliĉaj sciigi ke fine, dank'al franca scienculo, S<sup>ro</sup> Maiche, tiu eltrovo estas farita. Tamen apenaŭ ĝi estas komencita, kaj S<sup>ro</sup> Maiche laboras por plibonigi siajn aparatojn.

Li lokas sur tablon, en sia laborejo, telefonon interligitan kun pilaro (serio da 3 piloj) kaj induktbobino speciale konstruita de li mem; la elektra fluo alvenas en kadron konsistantan el fadenoj kunvolvigitaj. Sama aparato estas en alia ĉambro, eĉ en lia ĝardeno, kaj, metante receptilon (sonricevilon) apud oreilon, oni aŭdas sonon de la voĉo de persono parolanta, kaj liajn parolojn.

Ni reparolos detale pri tio, kiam la eksperimentoj estos finitaj; sed ni povas jam danki la eltrovinton, pripensante la utilojn de la senfadena telefonio, dum paco aŭ batalado, kaj precipe por komunikado kun submarŝipoj.

MARCEL FINOT.

## La Vizitkartoj

tradukita laŭ de ERNEST d'HERVILLY, konata franca aŭtoro.

Komence, unu deklaro:

Mi estas tute favora al la sendo de l' vizitkartoj, principe.

Kial?

Tial ke mi estas konvinkita, ke penadante eviti, pro mallaboremo, la malpezajn devojn de l' societa vivo, — kaj la sendo de l' kartoj estas unu el ili, — oni sukcesos vesti nur per ĉifonajoj tiun grandan kaj ĉarman sinjorinon, tiel admireginde vestitan alitempe, kaj kiun Eŭropo kaj eĉ la ceteraj partoj de l' mondo enviis multege pli ol nian magistrataron, kaj kiun ili nomis: la franca ĝentileco.

Iom post iom, malzorgante la servemojn, malŝatante la komplezojn, forgesante la delikatajn ĝentilaĵojn, malestimante la deziron fari al la ceteraj kion oni volus, ke oni faru al ni, kio estas la bazo de la ĝentileco, oni rapide reirus al la primitivaj moroj de l' pratempa epoko, kiam la viroj esprimis sian amon al ia virino kaptante ŝin je la hararo por ŝin treni al la edza sterko de sia domo de troglodito.

Ankoraŭ ni ne alprenis tute tiajn kutimojn. Unue, (mi ne intercas paroli malfavore pri la kombistoj) tial ke la hararoj de l' virinoj, ne estante tiel intime ligitaj al ilia kara kranio kiel ĉe la pratempa epoko, oni provus vane, iafoje, kapti ilin fortege je ilia hararo; poste, tial ke dank' al la penadoj de kelkaj el tiuj samaj virinoj kun tiel artecaj harligaĵoj, la franca ĝentileco ankoraŭ sin montras ĉe iliaj adorantoj, en la sola celo plaĉi al ili.

Ne, ni ne estas tuj reirontaj al la interŝanĝoj de batoj de la ŝtona epoko; sed estas ĝenerala emo, tion oni devas diri, al la evitado de la ŝatindaj devoj de la monda vivo.

La vizitkartoj estas unu el tiuj devoj, ĉe la novjaro. Ni akceptu ĝin.

Nun, ni interkomprenu nin. Se mi estas favora al la sendo de kartoj al la dudeko, trideko da amikoj, da amemaj ĉeestantoj en la vivo, da homoj kun kiuj oni ĝojas, kun kiuj oni rapide trairas la ekzistadon, ian tagon ridante, ian tagon kun la okulo malseka, mi obstine ne konsentas je la sendo de kartoj al multe da malprecize konataj por kiuj oni sentas preskaŭ la saman indiferentecon kiel por la poŝkestoj, en kiujn oni ĵetas la pakojn da kartonetoj destinataj al ili.

Ne, oni devas sendi nur, kion mi permesas al mi nomi motivataj kartoj, tio estas kartoj ilustritaj per unu vorto amema aŭ unu gaja parolo.

Tio estas tre bona, oni diros al mi; sed kial do vi sendas motivatajn kartojn al tiuj ĉeestantoj en via vivo, kiujn vi ofte vidas, kiujn vi eble vidis la antaŭtagon de l' novjaro.

Mia respondo estos tre simpla: Tio estas por fari plezuron al ili. Mi kredas, ke la tuta ĝentileco (kiu estas la esenco de la boneco) estas enhavata en tiu vorto, kiu ne estas de mi, sed de mia patrino.

Sin memforgesi, valorigi la aliulojn, doni al ili,

kiajn ajn estas iliaj priokupoj, furtivan (1) korbatojn pro kontentiĝo, tio estas la artikolo 1<sup>a</sup> de l' leĝaro de la ĝentileco.

Kiel estas pli ĝentile liveri al virino, ridigante ŝin, la okazon montri siajn belajn dentojn ol amindume diri al ŝi, ke ŝi havas admirindajn dentojn; tiel same estas pli ĝentile konstatiĝi al amiko ĉe l' mateno de la nova jaro, ke lia ĉarmo estas sufiĉe forta por elpreni vin el via mallaboremo, kaj meti la plumon inter viajn fingrojn, ol diri kiam vi lin renkontas: vi scias kiom mi vin amas!

Senkulpigoj? Mi konsentas pri ili nur por la homoj, kies profesio estas skribi, kaj kiuj, Prometeo de l' vulturo de la kopio, malplenigas ĉiutage korbajn da malkaraj inkboteloj.

Kaj ankoraŭ!

Koncerne la societuloj, sed naski iom da ĉarmo kaj amemo en iliaj rilatoj kun iliaj similuloj estas ilia absoluta funkcio.

Ilia vivo ne devas esti limigata en interŝanĝo de buŝtukoj malpurigitaj unuj ĉe la aliaj, kun toasto je l' kuiristo kiam la manĝaĵo estas bonega.

Ili devas penadi, en ordinara tago kiel en la novjaro, esti tio kio niaj patroj estis multege pli ol ni, servemaj gastoj, fertilaj (2) en tiuj surprizoj, kiuj havas nenian valoron krom la impulso (3) de amikeco kiu elpensigis ilin, sed kiuj estas kvazaŭ la parfumo de l' malnova floro de la ĝentileco.

Nu, sur simplan vizitkarton oni povas meti tridek-seŝ mil afablaĵojn, kaj eĉ belegajn artecajn farajojn.

Ĉe la XVIII<sup>a</sup> jarcento oni multe ŝatis (kaj la nuntempaj gusthavaj homoj estus ĉarmataj de ili, kiel iliaj prapatroj) tiujn ĝentilaĵojn, kiuj nun okazas tre malofte. Kaj tamen ili ne malhelpas rondanci.

En la antaŭa jarcento oni ne havis la timegindan multegon da delikataj kaj spritaj artistoj, kiuj de nun necesigis la kreon de speciala ministrajto; sed la riĉuloj delikatigitaj per la kontakto de la spirituloj sciis uzi la artistojn por doni elegantan eksteraĵon kaj artecan ŝajnon al ĉio, kion ili entreprenis por « gaje laŭri la floun de la rivero de l' vivo ».

Invitbiletoj por vespermanĝi, specialaj biletoj por spektakloj, balbiletoj, fine ĉiuj eblaj pecoj de kartono, kaj eĉ la kontraŭmarkoj estis ornamitaj de ravaj vinjetoj.

Oni ne kontentiĝis je tio, ke oni servis al vi trufojn kaj bestojn ekputriĝintajn, oni ornamis ilin kiel juvelojn per sprito kaj arto. La nombro de l' nuntempaj societuloj, kiuj daŭrigadas tiun noblan tradicion, kiun la dandoj nomas « malnova ludo », estas ho ve! tre limigita. Estas ankoraŭ iuj, kiujn oni amas pro ilia malofteco, sed ili estas malfortaj kiel la vintroj sen neĝo kaj kiel la perfekta ministraro.

Restas ankoraŭ la kartoj tute blankaj; ni ne forlasu do ili. Kaj se ni ne ornamas ilin per artecaj mirindaĵoj, ni turmentu nian kapon, ni serĉadu en nia koro por skribi ian koran afablaĵon sur la oficialaj kartonoj destinataj al niaj amikoj.

(1) France: furtif — angle: furtive — hispane: furtivo.

(2) Latine: fertilis. — france: fertile. — hispane: fertil. — angle: fertile.

(3) Latine: impulsio. — france: impulsion. — angle: impulse. — hispane: impulso.

Kaj eĉ se ili tion rigardus kiel submetiĝon ŝuldatan al sia supereco, kaj ne estus kortuŝataj de ĝi, ni daŭru pro la honoro de la malnova franca ĝentileco restadi tiaj, kiel niaj patrinoj nin faris, aŭfaj homoj

Certe, la Mizantropo (1) estas bela karaktero, sed, je diablo! mi neniam konsentus promeneti kun tiu besto, eĉ dum bela somera tago. Per ĝia sistema malŝato al la mondaj lokoj kaj al la flekseblaĵoj de

civilizita spirito, li igus mian promenadon tiel netolerebla kiel mia propra ekzekuto sur la placo de la Roquette (2) (Roket!)

Jen unu kiu, se li nun vivus, sendus la kartojn al la necesejo!

Mi preferas sendi ilin kun la malplej teda el miaj esprimoj al tiuj, kiuj faras al mi la honoron min ami.

*Kun l' afabla permeso de l' aŭtoro,  
Tradukis JOHANINO FLOURENS.*



### Nenia mono kaj nenia krimo.

La homoj kiuj kredas, ke la monaro estas la fonto de ĉiuj malbonaĵoj, povas trovi subtenon por tiu ĉi kredo en la insulo de Tristan d'Acunha. Ĉar, kvankam sepdek sep blankrasuloj loĝas sur tiu muŝmakula insulo, en la Sudatlantiko, ne estas mono en uzado inter ili, kaj estas sufiĉe rimarkinde, ke estas nenia malvirto.

Skribis vizitanto de la insulo antaŭ nelonge. « Mono estus senutila, ĉar nenio estas aĉetebla », — kaj li daŭrigis, — « Vivante honeste, sobre kaj harmonie, liberaj ŝajne de ĉia krimo, malvirto, malpaco kaj tordeco, ŝajnas ke la loĝantoj de Tristan d'Acunha elfaris senkonscie la projekton tenitan de la unua koloniano de la jaro 1811<sup>a</sup>, Jonathan Lambert, tenante sin ekster la atingo de la mizero kaj ordinara malfeliĉeco.

Ili ne havas leĝojn skribitajn, ĉar ĉiu estas leĝobeanta; ili nenion bezonas; ĉiu faras tion, kio ŝajnas justa al ĝia propra komprenado. Ili ne havas malliberejon: ĉar krimo ne estas konata inter ili, tia institucio estus superflua. Ili ne havas registaron kaj ne pagas taksojn. Ili ĝuas perfektan sendependecon kaj liberecon, kiuj neniam malbonmoriĝas. La komunumo estas tute bonmora. »

La eksterulo kiu, antaŭ nelonge, vizitis tiun lastan Arkadion, faris tiel, por eltrovi ĉu ĝiaj loĝantoj volus ĝin forlasi.

Tristan d'Acunha apartenas al Anglujo, kaj en Januaro 1903<sup>a</sup>, Brita militŝipo vizitis la insulon, kaj poste raportis, ke la loĝantoj estas lacaj je ilia izolata vivo, kaj volas forlasi la insulon. Tial la registaro de

la Kapkolonio sendis agenton kaj oferis al la insulano senpagan forveturon al tiu lando, kaj samtempe novan vivekpaŝon. Sed kiam la agento diris al la homoj de Tristan d'Acunha, kiel malsama estas la ekstera mondo de ilia insulhejmo, la malgranda komunumo da sepdek sep homoj decidis lasi « sufiĉe bone sufiĉi. »

Tristan d'Acunha estis ektrivata en 1506, de la Portugala marvojaĝanto, kies nomon ĝi portas. Granda Britujo prenis posedon de ĝi post kelkaj 300 jaroj, kaj dum Napoleon estis mallibera en Sankta Heleno, 1300 mejloj malproksime, metis tien grupon da britaj soldatoj, kiel antaŭpostena gardejo. Post la morto de Napoleon, en 1831, la soldatoj estis retiritaj, sed suboficiro G'lass kuu lia edzino kaj lia familio kaj kelkaj aliaj homoj, havis permeson tie resti. En 1833 la nombro de l' loĝantaro estis kvardek, kaj en 1855 ĝi atingis okdek kvin. Dum la daŭro de la sekvantaj dudek jaroj, dudek kvin forlasis la insulon, irante Unuigitajn Ŝtatojn, kaj kvardek kvin elmigris Kapon, malmultigante la nombron de la restantoj en la insulo ĝis tridek ses.

Kalkulado farita en 1880, montris 100 tieulojn, kaj tiu nombro daŭris esti la altakva marko de la anoj. Nur unu neleĝema naskiĝo okazis dum la estado de la komunumo, kaj tio pro la perfideco de maristo, kiu loĝis tie kelkajn monatojn. Okazis du perfortaj mortoj, sed ili estis memmortigoj kaŭzitaj pro malsaneco.

C. CLASSEN.  
(U. Ŝ. de A.)



### « La Viska Branco », malnova angla kanto.

En vestiblo de l' kastelo pendis Viska Branĉo, ilekso ornamis la malnovajn kverkajn murojn. La Vasaloj de l' Barono ĝuadis ĝojan Kristnaskan feston.

La Barono kun patra amo rigardis sian belan helokulan filinon (novedzinon de l' brava, juna Lovelo), gracimovantan inter la noblaj gastoj).

« Mi eklaciĝas je l' dancado: » ŝi ekkriis. « Atendu, atendu iom! mi kaŝos min. Lovelo kara, estu la unua eltrovi mian sekretan kaŝejon; zorgege serĉu min. »

Ridetante ŝi forkuris, kaj geamikoj ŝiaj tuj sekvis serĉante. En turojn kaj anguletojn ĉiujn, ili iradis, tra la plej altaj, malaltaj, izolaj lokoj ili ekscitite vagadis, kaj elezamenis vane.

Dum la nokto kaj sekvanta tago la serĉadon ne

ĉesis, eĉ ĝis semajnoj estis forpasintaj — Elfrenez-iginte Lovelo ekkriis, « Ho, karulino mia! kien vi iris, kie estas vi kaŝita? » Mi malĝojas pri vi, sola mi estas sen vi ».

Multaj jaroj pasis — La malĝojega okazo ekra-kontiĝis kiel historieto de l' tagoj longe forpasintaj. — Kiam oni vidis Lovelon, infanoj mallauĉe diris unu la alian — « Jen, la kompatinda maljuna sinjoro ankoraŭ ploras sian amatan edzinon. »

Fine eltrovigis en malluma angulo de l' kastelo malnova, kverka kestego — oni malfermis ĝin. Jen, kuŝas skeleto en la edzina vestaĵo de l' amegitata perdulino. Ho ve, malĝoja sorto!

En gaja humoro ŝi kaŝis sin en kestegon, kies kovrilo fermis per risorto, kaj vivantan ŝi entombigis sin.

*Tradukis proze E. J. C. (12.926).  
(Anglujo).*

(2) Placo en Parizo sur kiu oni ekzekutas la kondamnitajn.

(1) France: misanthrope. — hispane: misantropo. — angle: misanthrope.



# DIVERSAĴOJ



## Vasiliso la Saĝega

Rusa popola Fabelo.

### I.

Reĝo rajdis hejmen el malproksimaj landoj. Li estis laca; sofo lin turmentis kaj jen li vidis lagon. Forlasinte sian ĉevalon li klinis sin al la akvo, eĉ lia tuta barbo eniris en ĝin; li trinkis, trinkis kaj ne povis malsoiĝi. Dume la Reĝo de l' Maro ekkaptis lian barbon kaj lin tenis. La reĝo finis la trinkadon, ektiris la barbon el la akvo — sed la afero malsukcesis.

« Ne penadu, reĝo, » — aŭdas li el la akvo — « mi vin ne lasos, ĝis vi promesos al mi fordoni tion, kio estas al vi pli kara ol via edzino, kaj kio, estante ĉe vi en la palaco, ne estas ankoraŭ konata de vi. »

La reĝo treege amis sian edzinon kaj pensis, ke nenio povas esti al li pli kara ol ŝi, escepte tio, kion li ankoraŭ ne vidis. « Fordoni kion mi ne vidis, tio ne estas malfacila » — diris li — « lasu nur min; mi donos al vi, kion vi petas. »

Hejmen alvenis la reĝo. Lia edzino renkontis lin sur la perono, kaj sur ŝiaj manoj kuŝis malgranda fileto, kiu naskiĝis antaŭ nelonge, sed la reĝino jam ne estis havinta tempon por sciigi pri tio sian edzon. Tiam la reĝo divenis, kion li promesis al la Reĝo de l' Maro; la reĝo ĉagreniĝis, sed nenio estas farebla: li devas eduki sian filon ne por sia ĝojo, sia konsolo, sed por tiuj de la Reĝo de l' Maro.

### II.

La reĝido elkreskis kaj fariĝis belkreska bravulo. La patro alkondukis lin al la lago kaj diris:

« Serĉu tie ĉi, Ivaĉjo, la ringon, kiun mi perdis ĉe la bordo, dum mi veturos ĉasadi. »

La ringon serĉas la reĝido kaj ĝin trovi ne povas. Subite renkonte al li iras maljunulino:

« Ne serĉu » — diras ŝi — « reĝido, tion, kio ne estas ĉi tie perdita, sed prefere aŭskultu, kion mi al vi diros. »

Kaj ŝi rakontis al li, kiel lia patro fordonis lin al la Reĝo de l' Maro. Ekploris la reĝido kaj la maljunulino konsolas lin:

Ne timu, mi vin instruos kion fari. Alflugos ĉi tien dekdu kolombetoj, ili frapos la teron malsekan, fariĝos belegaj junulinoj kaj ekkuros al la lago por bani sin. Do kaŝu vin en arbetoj, forprenu de la plej maljuna el ili ŝian sarafanon (1) koloran, kaj poste diru nenion, ĝis la junulino vin vokos. »

Kaj ĉio tiel okazis. Kiam la junulinoj ekvidis, ke la sarafano de la fratino forestas, ili timiĝis, frapis la teron malsekan, fariĝis kolombetoj kaj forflugis.

Nur Vasiliso la Belega restis sola sur la bordo kaj ekvokis: « Ho! malkaŝu vin, kiu forprenis mian veston; se vi estas maljuna, vi estos mia patreto, se juna — mia edzo. »

Eliris Ivano-Reĝido, redonis al la junulino ŝian sarafanon, kaj Vasiliso la Belega, la Saĝega, tuj lin ekkonis: « Bonan tagon » — diras ŝi — « Ivano-Reĝido; mia patro, la Reĝo de l' Maro, jam de longe vin atendas. Iru al li kaj nenion timu; vi fariĝos mia edzo. »

Ivano-Reĝido saltis en la lagon kaj ekaperis en la palacon de la Reĝo de l' Maro.

### III.

Ekkoleris kontraŭ li la Reĝo de l' Maro, tial ke li pli frue ne venis, kaj devigis lin fari laboron:

« Estas kunmetitaj sur la kampo ĝuste tri centoj kaj tri da garbaroj; eldraŝu en unu nokto la tutan grenaron, sed atentu, ke vi ne disjetu la garbarojn, kaj ne knedu la pajlon. »

Ivano-Reĝido iris en reĝan ĝardenon, ekploris, sed Vasiliso Saĝega jam estas tie ĉi:

« Ne ĉagreniĝu » — diras ŝi — « reĝido, la mateno estas pli bona konsilanto ol la vespero, ĉio estos farita, kuŝiĝu kaj dormu. »

Kiam ĉiuj en la palaco estis ekdormintaj, Vasiliso eliris sur la peroneton kaj per laŭta voĉo ekkriis:

« He, vi formikoj rampemaj! Kolektiĝu apud mi, venu de la tuta tero, elprenu el la patretaj garboj ĉiujn grenerojn, kunportu ilin en la grenujojn vastegajn. »

De ĉie formikoj tuj alvenis, alrampetis, kovris la tutan kampon, komencis laboradi, elprenis ĉiujn



« Dume la Reĝo de l' Maro ekkaptis lian barbon kaj lin tenis. »

(1) « Sarafano » — nacia vesto por virinoj kaj fraŭlinoj en Grandruslando.



grenerojn nete-netege. Ekplaĉis al la Reĝo de l' Maro ĉi tiu laboro. Li ordonis alian: ke Ivano-Reĝido konstruu dum unu nokto palacon el oro pura, ke ĉe la palaco estu preĝejo el vakso helbrila, kaj ke estu elgluita ĉi tiu preĝejo nete-netege, sen makuleto, sen difekteto. Denove deiris Ivano-Reĝido, ekmalĝojis, ekploris: kiel li faros tian laboron malfacilan? Sed Vasiliso Saĝega denove lin konsolas:

« Ne malĝaju, ne malĝoju: ĉio estos preta ĉe la mateno, kuŝiĝu kaj dormu. »

Ŝi eliris en profunda noktamezo sur la peroneton kaj ekvokis:

« He! vi, skarabetoj, insektetoj subteraj, fosemaj, kaj vi, abeletej flugemaj, kolektiĝu apud mi, venu de l' tuta mondo, konstruu palacon el oro, elgluu preĝejon el vakso helbrila. »

Skarabetoj, insektetoj alrampetis, altrenetis orajn grajnetojn, per grajnetoj sur grajnetoj konstruadis palacon, kaj abeletej elgluadis preĝejon; kaj ili tute finis ĉe l' mateno palacon kun preĝejo je l' gloro.

Mirigita estis la reĝo: « Ne per via laboro, li diras, vi tion ĉi faras, bravulo; mi vidas tiun, kiu helpas al vi. Nu tiel estu; se vi ekkonos la fianĉinon difinitan de l' sorto, mi prenos vin kiel bofilon; se vi ne ŝin ekkonos, la kapo for de la ŝultroj! »

La reĝido iris en sian ĉambron, sidigis sin, ekĉaĝreniĝis. Flugis al li muŝeto en la ĉambron, frapis la teron, fariĝis Vasiliso Saĝega.

— « Aŭskultu, » — diras ŝi — « reĝido: morgaŭ la patro elirigos nin, ĉiujn dekdu fratinojn, kaj ordonos ke vi divenu tiun, kiu estas mi. Vi rigardos atente: sur mia yango muŝeto rampetos; kuraĝe prenu min tiam je l' mano, alkonduku min al la patro. »

La sekvintan tagon Ivano-Reĝido faris tiel, kiel instruis lin Vasiliso Saĝega. Geedzigis ilin la Reĝo de l' Maro, kaj ili komencis vivi-vivadi en ilia ora palaco.

#### IV.

Enuis Ivano-Reĝido vivante en la subakva regno; li ekdeziris reiri al siaj gepatroj. Li tion diris al Vasiliso Saĝega.



### « Io bona povos veni el Anglujo ».

Mi iris en la teatron hieraŭ. Oni ludis Faŭst'on. Estis la dekdua fojo, kiam mi ĝuis tiun ĉi ĉefverkon. La mizeruloj staras duope antaŭ la pordeto dum du horoj. Estas malvarme sed la venonta plezuro varmigis la korojn. La varmo de l' imagado estas pli forta ol la malvarmo de l' vetero. Richepin estis prava: la du maljunuloj vere varmiĝis je la brileco de la okuloj de la kato dum la Kristnaska nokto. Ni aĉetis la vesperan ĵurnalon, ni metis en niajn poŝojn « Tra la mondo » ĉiam amuzan kaj interesan; en nian butontruon ni ne metis blankan aŭ ruĝan floron sed verdan stelon, fine ni plenigis niajn poŝojn per esperantaj cirkuleroj kaj broŝuretoj; kaj la ĝojo en koro ni foriris.

Ĉar ni estas mizeruloj, ni staris antaŭ la pordo kaj ni konsolis nin rememorante niajn praavojn de Notre Dame de Paris, kiuj dormis en la teatro por ne perdi la plej bonan lokon, atendante pacienciege la morgaŭan feston. Malfeliĉe ni ne ricevis la turkan aŭ ĥinan apation kaj de tempo al tempo eliris el niaj buŝoj vortoj, kiuj ne estas diamantoj aŭ perloj, kelkaj « Per la kornoj de Meŝto, per la ventro de Bakus; estas malvarme tie ĉi amiko, fermu la fenestron, blovas la aero tie ĉi. »

Ni eniras... neevitebla puŝado; ni kuras en la teatro, rapide ni elektas bonan lokon, ni kuras tien kaj ni lasas nin fali. Ni atingis la celon sed ni devas ankoraŭ atendi unu horon. Ni eltiras « Tra la mondo » ni legas ankoraŭ unufoje detalaĵojn pri la dua kongreso, k. t. p.

Subite la teatra kurteno falas; ne estas la kutima kurteno

— « Malfacilan taskon vi ordonis al mi, respondis Vasiliso: mia patro bonvole nun ne forlasos vin; kaj, se ni forkuros, li sendos post nin persekutantojn. Sed estu tiel, por vi mi ekprovos. »

Ili atendis ĝis la nokto, selumis ĉevalojn kaj rapide ekrajdis, per ilia tuta forto, de la subakva regno.

La Reĝo de l' Maro vekigis, ekserĉas — nek filino, nek bofilo ĉeestas. Li sendis post ilin persekutantojn Desaltis Vasi iso de l' maro. Ŝi aliformigis Ivanon-Reĝidon en paŝtiston kaj sin mem en ŝafineton. La paŝtisto paŝtadas la ŝafineton; la persekutantoj preterrajdas, demandas, ĉu li ne vidis reĝidon kun reĝidino. « Mi ne vidis ilin » diras li.

Ili serĉadis, serĉadis kaj revenis en la subakvan regnon.

Ekkoleris la Reĝo de l' Maro, ke la persekutantoj ellasis la paŝtiston kun ŝafineto; li ekrajdis mem por persekuti la forkurintojn.

Vasiliso aŭdas la piedfrapadon de l' patra ĉevalo, ektimas, aliformigas la ĉevalojn en riveron, larĝan, profundan, la reĝidon en anason kaj ŝi mem fariĝas anasino. La Reĝo de l' Maro alrajdis ĝis la rivero; tuj li divenas kia anaso kaj anasino naĝadas; li fariĝas aglo kaj volvflugetas sur ilin, sed ne povas kapti ilin: ambaŭ subakviĝis kaj ne sin fordonas.

La Reĝo de l' Maro ekfuriozis, tondro bruegis, fulmo brilegis, pluvego falis, sed la rivero fluis kaj fluis, portis anason kun anasino al la hejma bordeto: kondukis ilin la ondo al la palaco mem de l' patro-patreto; ili frapis la teron, fariĝis Ivano-Reĝido kaj Vasiliso Saĝega; renkontis ilin la gereĝoj sur la perono, prenis ilin je l' blankaj manoj, kondukis ilin en palacon ortegmentan.

La Reĝo de l' Maro do bruegadis, bruegadis kaj kun nenio reiris en sian subakvan regnon.

*Esperantigita de*

ROMANO FRENKEL.

(Siberujo).

sur kiu oni legis anonecojn pri sapo, vino, biero, tuko, hoteloj kaj aliaj malsencaĵoj: la kurteno, tiun ĉi fojon, estas verda kaj blanka; sur la kurtenon oni disemis smeraldajn stelojn, en la centro brilas kiel multkostaj ŝtonoj la okuloj de nia heroo Zamenhof. Lia animo lumigas la tutan kurtenon per lumo dia. Li multe similas al Faŭst'. La blonda « Marguerite » metas sur lian kapon, la laŭran kronon de gloro. Apostoloj el ĉiuj nacioj ĉirkaŭas lin, ĉiuj sidas al la sankta tablo, manĝas la saman panon, trinkas la saman vinon. Ili ĉiuj estas fratoj en Zamenhof. La vortoj Esperanto en oraj literoj brilegas kaj sendas flamojn. Meŝto per granda tranĉilego atakas furioze ĉiujn literojn, ĉiu bato nur naskas aron da fajreroj, kiuj orumas la kapon de la majstro kaj de la apostoloj. Ĉe la malsupro de la kurteno oni legis. « Per la internacia lingvo de la barbareco al frateco ».

La kurteno « fireproof » (kontraŭ firo) falas. Mi estis revinta... La muzikistoj eniris. La muziko estis belega sed nenio povis malaperigi larevon. En mia cerbo Faŭst' estis Zamenhof, Marguerite, la nova kara lingvo Esperanto, tiel dolĉa, tiel bela, tiel bona, lingvo de amo, lingvo de frateco. Meŝto estis la kontraŭulo, kies batoj de tranĉilego nur servis al la gloro de la majstro kaj de la apostoloj, orumante ilian kapon.

Ĉiuj homoj, kondukataj de Marguerite, altiĝis al la ĉielo en nubo ruĝa kaj ĉio estis finita. La mondo estis savita.

Ni uzu la kurtenoin de l' teatroj.

F. L. G. MARÉCHAL,  
el Leeds (Anglujo).

# A New Universal Language That is Not a Jfad...

Esperanto, with Its 2,500,000 Students,  
Is Getting Full Recognition in Boston.

Harvard Men Take It up,  
Technology Gives Encouragement.

No Other Language  
Is Mastered so Easily.



## Bibliografio kaj Kroniko

### Sensacia artikolo pri kaj por Esperanto!

Nia bonega kunfrato « L'Espérantiste » enhavas pleje interesajn sciigojn pri la galopanta! movado esperantista en U. S. de A.

Ni povas ilin plenigi per kelkaj detaloj. Nia paĝa supraĵo estas, malgrande, kopio de paĝa supraĵo de sensacia artikolo presita en la grava ĵurnalo « THE SUNDAY HERALD » el Boston.

Unu el ĝiaj 12 paĝoj grandformataj (65/55) estis tute dediĉita al Esperanto. Krom la ĉi supran bildon, ĝi enhavis kuriozan fotografaĵon de l'esperantistaj lernantoj de *Roxbury Latin School* kun portreto de l' prof. S<sup>ro</sup> Lowell, kaj ankaŭ tiun de S<sup>ro</sup> Edward K. Harvey, la sindona sek. de « Boston Esperanto Society ».

En Chicago, skribas al ni S<sup>ro</sup> F. G. Morin, tre prospera estas la « Esperanta klubo de Chicago », helpata de « THE CHICAGO SUNDAY CHRONICLE » en kiu nia konata samideano, Pro A. M. Grillon donas regule artikolojn kaj lecionojn.

Samajn kontentigajn sciigojn el Philadelphia, de S<sup>ro</sup> Lewis B. Lüders, kiu faras kurson al 50 lernantoj. Sendante tiujn sciigojn, li nin skribas: « Kaŭze de la ilustraĵoj, via gazeto estas al mi la plej interesa memoraĵo de mia vizito ĉe la kongreso de Genève ».

La ĉi suba sciigo montras ke niaj amerikaj pioniroj ricevis novan armilon por sia poresperanta batalado.

#### Practical and Theoretical Esperanto, de D<sup>ro</sup> Max Talmey.

Tiu ĉi libreto, verkita de D<sup>ro</sup> Max Talmey, la sindona fondinto kaj prezidanto de la Esperantista grupo de New-York, estas tre taŭga tiel por la eklernantoj kiel por la lernantoj. Ĝi estas unu el la plej bonaj lernolibroj jam estantaj.

D<sup>ro</sup> Talmey tre zorge pritraktis la gramatikon, aparte la elparolan demandon kaj la uzon de l' suŝksoj.

Ni aldonas ke, per la praktika parto aldonita al la gramatiko, la ekzercoj por traduko kaj la poezioj de D<sup>ro</sup> Zamenhof, la libro de D<sup>ro</sup> Talmey estos bonega armilo en la manoj de niaj Nord-Amerikaj samideanoj. (*Ĉe Universal language publishing Co — 62 W. 126<sup>th</sup> St., New-York City; kaj 11-13, Summer st. Boston-Mass.*)

D<sup>ro</sup> M. P. G.

En « The Ohio Sun » 9<sup>an</sup> de Okt. 1906, bona poresperanta artikolo de D<sup>ro</sup> G. B. Viles, el la germana departamento (O. S. V. Columbus, Ohio, U. S. A.).

### La tria Kongreso.

La *Provizora Organiza Komisiono*, kies konsiston ni donis tuj post la kongreso, estas oficiale aprobita de la komitato de B. E. A., kaj alprenis la titolon « *La Trio por la Tria.* »

Tiu ĉi moderna *triumvirato* (trivira regnestro) estas jam sur la vojo al la sukceso, kiel ĝin pravas la jenaj gravaj rezultatoj akiritaj (oni ilin diskonigu kiel eble plej dise per la naciaj gazetaraj):

La *Konsilantaro Universitata* kunvenis Novembron 2<sup>an</sup> kaj rekomendis al la *Senato* doni al la Organiza Komisiono la uzon de diversaj Universitataj ĉambroj dum la semajno de la Kongreso.

La *Urba Konsilantaro* kunvenis Novembron 9<sup>an</sup> kaj decidis doni al la Organiza Komisiono la senpagan uzon de la *Urbestrejo* kun orgeno, de la *Gren-Vendejo*: la plej vasta ĉambrego en la urbo, kaj de ĉiuj komunumaj konstruaĵoj dum Aŭgusto 12-17, kiujn datojn la Trio elektis por la *Oficiala Kongreso*. Tio estas tre grava interespruvo, ĉar la Urbo faras ĝuste por Esperanto tion, kion ĝi faris por la Brita Asocio.

Tiaj rezultatoj, diskonigitaj, certe instigos entuziasmon kaj decidigos multajn personojn transiri la « Kanalon », alie « Manikon », por veturi ĝis la glora Universitata Urbo.

Sed ĉar la Trio konsistas el homoj praktikaj, ĝi decidis fondon de « Kongresa garantia sumo », subskribota de la britaj esperantistoj, kaj por starigi la « fondon », la *Trio* garantias 300 sterlingajn funtojn, t. e. 7.500 fr.

Grava afero estas logigi la multajn geesperantistojn esperatajn. Do ĉiuj personoj, kiuj havas la *nunan intencon* ĉeesti la kongreson, bonvolu sciigi, poŝtkarte, la *Trion*, konigante la nombron kaj sekson.

Tiuj sciigoj estas elĉerpitaj el « The British Esperantist ». Tiu bonega revuo, kiu tiel efiĝe, de du jaroj, helpis nian disvastigon tra la tuta Brita Imperio, intencas ankoraŭ plibonigi enirante en sian trian ekzistan jaron. Venke tiu *tria* jaro faciligos la organizadon de l' *tria* kongreso.

Denove ni instigas niajn legantojn aboni « The British Esperantist » kaj tiel, siaflanke, helpi kaj la gazeton kaj la disvastigon de Esperanto en la Imperio sur kiu la Suno neniam kuŝiĝas.

Ni transdonos plezure la abonojn (4 fr. ĉiujare).

## Pola Antologio de Kabe.

Ĉi tiu libro estas vere atentinda instruilo por la nepolaj esperantistoj. Certe ĉiu el ili konas la gloran nomon de Sienkiewicz, kaj kredeble legis kelke da liaj ĉefverkoj, tradukitaj en sian nacian lingvon; sed kiom malmulte konas la nomon de Gawalewicz, de W. Gomulicki, eĉ de Prus! Mi aŭdis dum la lasta kongreso, ke la admirantaj lin sampatrujanoj de tiu ĉi lasta, lin proponas por la venonta literatura Nobela premio; kaj tamen ni devas konfesi ke, ĝis tiam, lia nomo estis de mi tute ne konata.

Ĉar, efektive, la malbonegaj felietonistoj, kies verkaĉoj plenigas la malsupron de la ĉiutagaj gazetoj francaj, anglaj, germanaj k. c., pli facile trafas, dank'al la disvastiĝeco de sia lingvo, tutmondan famon, — famon feliĉe nedaŭran — ol iu genia pensulo, kiu skribas en norvega, sveda, dana, flandra, bohema aŭ pola lingvo.

Konigante al ni la ĉefverkojn de la literaturo de la malmulte disvastigitaj lingvoj, Esperanto malfermas al ni novajn horizontojn en la mondo de la penso, kaj bonege utilas por la perfektigo de la homa spirito.

Ĝi estas ankaŭ, en ĉi tiu okazo, ilo de justeco, helpante la malgrandulojn en sia batalado kontraŭ la englutemo de la granduloj; kaj la homoj kiel Kabe, D<sup>ro</sup> Seynaeve, Van Melckebeke, faris plej patriotisman laboron, kolektante eltiraĵojn de sia literaturo, en librojn kiel *Pola antologio*, aŭ *Paĝoj el la Flandra literaturo*.

En tiu *Antologio* ni trovas prozaĵojn ĉerpitajn el la plej diversaj aŭtoroj, precipe el la malplej konataj ekster Polujo. Kaj tiuj eltiraĵoj estas skribitaj pri la plej diversaj temoj: iuj, kiel *La lasta amkunveno* (Gawalewicz), *u si amas, aŭ ne amas?* (Prus) k. c... estas aŭ humoraj, aŭ simplaj rakontoj en kiuj la homaj sentoj estas ĉiam vive priskribitaj kaj reliefe prezentitaj.

En aliaj kiel en *Srul el Lubartov* (Szymanski), *La Lanternisto* (Sienkiewicz), k. c. la temo estas amo al la patrujo; en *Kion ne komprenas la hirundoj kaj papilioj* (Gomulicki), *Legendo* (Orzesko) k. c., estas la amo al la homaro.

En *La Flikisto*, Junosza priskribas la obstinan karakteron, la laboremecon de la popolana hebreo. En *la Profundaĵoj*, de Raymond memorigas nin pri *Quo vadis*, igante nin vivadi dum la unuaj centjaroj de la kristanismo. Kaj en *Ofero al la dioj*, Waclav Sieroszewski, la aŭtoro de la terura verko *La Fundo de l' Mizero*, ankaŭ tradukita de Kabe, konigas al ni la malfacilan vivadon en la malproksimaj regionoj de l' azia Ruslando, kie la frostoj, la senfrukteco de la tero kaj la malsanoj, igas la homojn pli senkompatemaj unu por la alia, kaj malpli sentemaj por la doloro.

Sed precipe kelkaj el tiuj ĉi eltiraĵoj, kiel *Kion ne komprenas hirundoj kaj papilioj*, *Ombroj* (Prus), *La Suno de l' Mondo* (Prus), *Du herbejoj* (Sienkiewicz) plej plene havas slavan karakteron. Ili ĉiuj komencas, prezentante al ni mirinde priskribitan landon aŭ fizionomion, aŭ senton penetre studitan, per « la plej akuta — kvazaŭ angla — observado, malakrigita de ia konfuza, laca, nur orienta rezignacio, kiel bonege skribas S<sup>ro</sup> Cart en la antaŭparolo. Sed, iom post iom, ideo ekkorpiĝas, la personoj de la rakonto, iliaj faroj, aperas kiel objektoj de enigmo. kies solvon donas al ni la lastaj vortoj. Kaj certe tiuj enigmoj ne estas tuj plene kompreneblaj de ni; ni bezonas relegi la rakonton por fine kompreni la penson de la aŭtoro, kaj pro tio, tial ke tiu legado igas nin pripensi, tial ke, ankaŭ, la traduko de Kabe estas el la plej bona Zamenhofa stilo, oni devas konsideri tiun libron kiel unu el la plej ŝatindaj en literaturo, kaj konservi al ĝi honoran lokon en ĉiu esperantista biblioteko.

2 fr., ĉe Hachette kaj K<sup>o</sup>

URSO.

« Tutmondaj fajro-kutimoj » de H. W. Southcombe. — En nia aprila numero ni aludas tiun verkon, kvazaŭ ĝi estus konata de niaj legantoj; kaj, antaŭ ne longe, ni ekvidis ke la raporto verkita je la momento de ĝia apero estas ne presita!

Ni rapidas repari tiun bedaŭrindan forgeson. La volumeto, en kiu la aŭtoro priskribas fajro-kutimojn el multaj landoj, estas pleje interesa, ĉar la diversaj ceremonioj estas verkitaj laŭ sciigoj senditaj de ĉiulandaj esperantistoj. Ĝi do bonege

montras la potencon de Esperanto por la internaciaj enketoj. Ni varme! rekomendas la « fajro-kutimojn » al la scienculoj (Ĉe B. E. A. 13, Arundel Street, Strand, W. C. London England. 35 cent.)

« Kio povas okazi, se oni donacas surprize ». Humoraĵo de Fritz Reuter (48 paĝoj), el la subgermana dialekto tradukita de E. Ĉefeĉ, kun 16 ilustraĵoj desegnitaj de Otto E. Laŭ. La supredirita spritaĵo de Fritz Reuter estas traduko el lingvaĵo ne konata krom en malgranda parto de Germanujo kaj la teksto estas neniam antaŭe tradukita en iun modernan lingvon. Pro tio ĝi sendube estas internacie tre alloga legaĵo.

La komprenigo de la historio estas simpligata kaj faciligata per 16 beletaj ilustraĵoj; kaj deĉifrantu unufoje komencinta estos neeviteble tiel interesita, ke li dezirus daŭrigi la legadon, por ke li eksciu la malvolvon kaj finigon de la rakonteto. La traduko estas *severege apogita sur la «netuŝebla fundamento»* kaj plene deĉifrebla per la ŝlosiloj. La stilo, kritikita de esperantistoj el diversaj landoj kaj lingvoj, estas sennaciisma kaj internacie facile komprenebla.

La libro sin rekomendas do por komuna legado en esperantaj kursoj kaj por esti donace fordonata kun enmeita ŝlosilo al neesperantistoj kaj personoj, kiuj malfavore opinias pri la nova lingvo aŭ por esti demetata en la legoĉambrojn de hoteloj kaj restoracioj.

Ĉe S<sup>ro</sup> E. Ĉefeĉ, 45, Christchurch Road, Streatham, London, S.W. (1 luksa ekz. 70 cent.; 10 propagandaj ekz. 5 fr. — Pag. poŝtmarke, laŭ la efektiva valoro).

## Gazetaro.

Samideanoj en Sofia klopodas por fondi bulgaran revuon propagandan (*Leit<sup>o</sup> Silvestriev*). Atendante aperis organo de l' Tirnova grupo: « Lumo », enhavanta dulingvan propagandan fakon kaj esperantan literaturan parton.

« Eho Esperantista » daŭrigas enpresaj artikolojn teknikajn kaj komercajn. La redaktoro (S<sup>ro</sup> H. Brühl) eldonis, germane, bonan propagandan folion pri Esperanto.

En Bohemujo, S<sup>o</sup> Riegel el Praha, igis favoroj 3 novaj organoj:

« Studentsty Vestnik », organo de la « Unuiĝo de Bohemaj — Slavaĵ Studentoj », malfermas Esperantan rubrikon pri la vivo kaj agado de la bohema studentaro (Studento-Esperantisto, Praha — 1687 — II, Bohême).

La redakcio de « Ilustrované Prednásky » (Ilustritaj Paroladoj) raportos pri ĉiuj esperantaj presaĵoj, kiujn oni sendos laŭ la adreso: Rubriko de Esperanto, Praha, 1687 — II.

Fine « Narodni Olzov » Nacia revuo), grandnombre presota, enhavas ankaŭ Esperantan rubrikon. Ĝi estos la plej populara bohema revuo (Sama adreso kiel la antaŭa, S<sup>o</sup> STANISLAV BALIK c.k.berní úředník, Horaz-

dovice, *Cechy-Bohême*, transsendos al siaj lernantoj leterojn de personoj dezirantaj korespondi kun Bohemioj.


Niaj fervoraj samideanoj volas, aliparte, havi sian propran propagandan organon kaj, la 14<sup>an</sup> de Nov., la esperantista klubo en Praha decidis ĝin eldoni. La redaktoro estos nia konata amiko Ed. Kühnl, kies nomo estas sukcespromeso. La abonprezo por fremdlando estos 3 fr. 75 (3 kronoj en Aŭstrio). Adreso: Esperantista klubo en Praha II — 1322 — Bohemujo.

Aliparte, la grupo organizis belan feston kiu faris grandan impreson ĉe la ĉeestantoj (*El. let. de S<sup>ro</sup> Vaclav Riegel*).

En Varsovio, granda aktiveco, dank' al la senĉesa agado de niaj fervoraj samideanoj Kabe, Belmont kaj Grabowski kies ambaŭna malĉeestado en Genève ĉiuj bedaŭris. Ni donas ĉi apude raporton pri la interesplena « Pola Antologio » de Kabe, kiels talenton niaj legantoj povis ĝui per nia lasta numero.

La grupoj daŭras naskiĝi iom ĉie; ĉie ankaŭ organiziĝas la militiro por la jaro 1906-1907, kies fina celo estas la Cambridg'a kongreso.

Nia bonega kunfrato « The British Esperantist » donas jam kelkajn sciigojn pri tiu grava okazantaĵo, kaj ni jam scias ke



LA ESPERANTA EKSPOZICIO EN ROUBAIX (FRANCUJO).

la hon. sek. de l' organiza komitato, S<sup>ro</sup> Bolingbroke Mudie esq. proponis serion da tre praktikaj rimedoj al la komitato.

Kiel propagandajn rimedojn, ni konigu la *Ekspoziciojn* kaj la *Koncerto-Paroladojn*.

**Ekspozicioj.** — La grupo de Reichenberg (Bohemujo) ricevis oran medalon pro la sekcio esperantista aranĝita de ĝi en la germanbohema ekspozicio, pri kiu ni parolis en nia septembra numero (*El letero de S<sup>ro</sup> H. Rudolf*).

Dum la « Internacia ekspozicio pri la teksaj industrioj », la grupo de Roubaix (Francujo) organizis esperantistan ekspozicion. La vitrameblo, arte aranĝita, enhavis multajn ĉiusepacajn dokumentojn, inter kiuj leterojn kaj komercajn cirkulerojn en Esperanto. Ĝi estas premiita per arĝenta medalo (*El letero de S<sup>ro</sup> Ch. Dorion*).

La grupo esperantista de Amiens ricevis ankaŭ oran medalon pro tre interesa ekspozicio organizita de ĝia ĉiam agema komitato.

Ni rekomendas tiun bonegan manieron altiri la atenton al Esperanto, kaj gratulas la premiitojn.

**Koncerto-Paroladoj.** — Ii taŭgas pli bone ol la simplaj paroladoj por interesi la neesperantistojn. Jen estas, ekz, la programo de sukcesinta parolado farita de Kapitano Capé en Bourges (Francujo):

1<sup>o</sup> *L'Espero*; muziko de De Ménil kantita dum la Kongreso;

2<sup>o</sup> Parolado pri kaj por Esperanto;

3<sup>o</sup> Franca kanteto de Gab. Chavet pri la Boulogn'a Kongreso;

4<sup>o</sup> Lumbildoj kun klarigoj france kaj Esperante.

Aliaj celas precipe la esperantistojn. Jen estas ekz. la programo 1906-7 de l' « Glasgova Esperantista Societo ».

1906 — Okt. 15. Malferma kunveno. — Okt. 22. « Vizito al Boulogne-sur-Mer (Boulonjo sur-Maro), de S<sup>ro</sup> Prezidanto. — Nov. 5. Paroladaro. — Nov. 19. « Impresoj de l' Genèva Kongreso » (kun lumbildoj), de S<sup>roj</sup> Ernest G. Smith kaj Jan Wilson. — Dec. 3. Artikoloj kaj ludoj. — Dec. 17. Paroladoj de novaj societanoj.

1907. — Jan. 14 « Mia korespondado », de S<sup>ro</sup> R. J. M' Laren.

— Jan. 28. Senpreparaj paroladoj. — Feb. 11. « La Paco meze de la Batalado », de S<sup>o</sup> Aleksandro Easson, S. S. C. (de la Edinburgha Esperanta Societo). — Feb. 25. Paroladaro. — Mar. 11. Koncerto. — Mar. 25. Jarkunveno.

— Mar. 11. Koncerto. — Mar. 25. Jarkunveno.

— Mar. 11. Koncerto. — Mar. 25. Jarkunveno.

— Mar. 11. Koncerto. — Mar. 25. Jarkunveno.

— Mar. 11. Koncerto. — Mar. 25. Jarkunveno.

— Mar. 11. Koncerto. — Mar. 25. Jarkunveno.

— Mar. 11. Koncerto. — Mar. 25. Jarkunveno.

— Mar. 11. Koncerto. — Mar. 25. Jarkunveno.

— Mar. 11. Koncerto. — Mar. 25. Jarkunveno.

— Mar. 11. Koncerto. — Mar. 25. Jarkunveno.

— Mar. 11. Koncerto. — Mar. 25. Jarkunveno.

— Mar. 11. Koncerto. — Mar. 25. Jarkunveno.

— Mar. 11. Koncerto. — Mar. 25. Jarkunveno.

— Mar. 11. Koncerto. — Mar. 25. Jarkunveno.

— Mar. 11. Koncerto. — Mar. 25. Jarkunveno.

— Mar. 11. Koncerto. — Mar. 25. Jarkunveno.

— Mar. 11. Koncerto. — Mar. 25. Jarkunveno.

— Mar. 11. Koncerto. — Mar. 25. Jarkunveno.

— Mar. 11. Koncerto. — Mar. 25. Jarkunveno.

Ni ne povas ĉi tie paroli pri ĉiuj naskiĝintaj grupoj; sed estas interese proksimigi sur la papero la nomojn de l' « Esperanta Societo Sud-Rio-Granda » en Porto Alegre (Brazilujo) (\*) de l' « Wellington Esperantista Grupo » en Calcutta (Hindujo) (\*\*), kaj la jenajn sciigojn pri la Holanda esp. movado.

« La Holanda Societo Esperantista kreskas iom post iom, tiel kiel ĉiu nova ideo en Holando. Niaj sampatrujanoj honoras la latinan proverbon « festina lente » (rapidiĝu malrapide), tamen ni esperas ke, kiel sekvo de tio, la esp. movado akiros, kvankam tre malfrue, fortan fundon.

La movado iras tiel malrapide ankaŭ ĉar la ĵurnaloj kaj ĉefe la granda gazetaro, restas ĉiam silenta aŭ mokas pri nia celado.

Malgraŭ tio ekzistas en Holando certe centoj da personoj kiuj sin interesas pri Esperanto, kaj... kiuj timas aliĝi al nia Societo. Kial ?

Mi ne scias !

La jena fotografo estas la unua de nia Societo. Ĝi prezentas



HOLANDAJ SAMIDEANOJ.

inter aliaj, sidantajn apud la tablo, de maldekstren, S<sup>ron</sup> J. Bulthuis la jam konatan esperantiston, S<sup>ron</sup> D. Uitterdijk, nian prezidanton kaj pioniron de l' Esperanta movado en nia lando, S<sup>ron</sup> D. F. Romein sekretarion de l' Societo, eksoficiro de l' holanda hinduja orienta armeo, kaj S<sup>ron</sup> J. v. d. Ende la ageman prezidanton de l' Haga Grupo.

Tri fraŭlinoj prezentigas kiel floroj inter la nomitaj personoj. Afiŝo de l' Genèva Kongreso servas je propagandilo.

La ĉeestintoj estas de diversaj profesioj: doktoro medicina, stenografiisto, instruisto, librovendisto, bontemplanoj k. a.

Ni esperas ke ĉi tiu fotografo naskos intereson je aliĝantaj esperantistoj por la Esp. movado en nia lando kaj por ĝiaj malmultaj kunbatalantoj !

*Niemor.*

Oni skribas al ni, el Nolay:

« Lastan dimanĉon, 11<sup>an</sup> de Novembro, malgranda amika festeno okazis ĉe S<sup>ro</sup> Bord en Beaune. Ĉeestis geesperantistoj kaj skeptikuloj. Oni trinkis vinon « Mirinda », kiu estis tre ŝatata, kaj multe helpis al la konvertiĝo de l' skeptikuloj. »

Kompreneble, ĉar nenio pli bone taŭgas por esperantigi iun, ol ensorbigi la bacilon kun bonega ŝaŭmanta esperantista vino !

STELETO.

(\*) Sek.: R. Fred Geyer, Rua 7 de Setembro, 53, Porto-Alegre, Brazil.

(\*\*) Sek.: A. T. Simper, 144 Dhurumtollah St., Calcutta, India.

## La Pokalo Vanderbilt.

(6<sup>an</sup> DE OKTOBRO).

La ĉefa kurado de l' fino de la «sezono» estis la Pokalo automobila Vanderbilt, kurita en Long-Island apud Nov-Jorko sur 478 km.

Per tiu nova venko, kiu fermas por 1906 la serion de la grandaj kuradoj pri rapideco, la franca industrio renovigis sian triumfon de la antaŭaj jaroj.

La kurado estis, ja, fruktodona per faktoj. Sur tiu ĉirkaŭo je nur 478 km., kie, pro foresto de ĉiu efika polica protekto, granda parto de la 600.000 vidvolantoj, kiuj estis tute entuziasmaj ĉeestantoj, trairis la kuradvojon sen singardemo, kio kaŭzis morton por kelkaj el ili, la tasko de la kuristoj estis treege malfacila kaj la rolo de la veturiloj tre frakasema.

Nur duelo inter Francujo kaj Italujo estis la kurado.

*Wagner* sur sia *Darracq* estis probatalanto por Francujo kaj *Lancia* sur sia *Fiat* estis probatalanto por Italujo. La du viroj apenaŭ sin lasis; *Wagner*, antaŭe metiĝinte kaj ne perdante la vicon, ne povis forlasi sian terurindan kontraŭulon je pli ol ses minutoj.

La teraĵo estis malseka, glitiga kaj la batalo estis kredeble «ne ordinara» inter tiuj du reĝoj de l' kurbigo (direktŝanĝo), nome *Wagner* kaj *Lancia*.

*Wagner* intervjuita diris:

« Mi estis decidinta ke mi alvenos unua, se eble, kaj malgraŭ la malbona stato de la vojo en iaj lokoj, mi malakcelis eble kiel plej malmulte. Feliĉe mia veturilo estis solida, ĉar mi fariĝis al ĝi « dancon seriozan! » (Mi ne ŝparis ĝin).

« Mi, eble, estus irinta ankoraŭ pli rapide, sed la popolamaso estis tro densa kaj en iaj lokoj mi konis, je la unua fojo, tiun strangan senton, pripensante « Mi mortigos almenaŭ du homojn antaŭ la fino », kaj vere nemulto mankis por tio. Fine mi estas feliĉa esti trafinta la celon sen malfeliĉo kaj precipe esti la unua, ĉar mia firmestro estas tute kontenta! »

Jen teknikaj rezultatoj:

Unua: *Wagner* (Franca) sur *Darracq* en 4 h. 50 m. 10 s. Meza rapideco 98 km. 800 hore.

Dua *Lancia* (Itala) sur *Fiat* en 4 h. 53 m. 28 s.

Tria *Duray* (Franca) sur *Lorraine-Dietrich* en 4 h. 53 m. 28 s.

## La Mejlo kaj la kilometro sur ebenaĵo ĉe Dourdan.

(21<sup>an</sup> DE OKTOBRO).

La ĉinjara kurado sur unu mejlo, kaj unu kilometro sur ebenaĵo, organizita de nia kunfrato « L'AUTO » sukcesis kiel kutime; kaj certe, malgraŭ vetero iom necerta, la ĉeestantoj ne bedaŭris sian aliron, ĉar la spektaklo de malgrandigo de unu rekorda tempo estas ĉiam spektaklo ŝatinda.

*Lee Guinness* sur sia 200 m. ĉev. *Darracq* kun okcilindra motoro, trafis la mezan rapidecon 180 km. hore: la suriro de l' mejlo sen antaŭa irado en 41 s. t-e 140 km. hore kaj la suriro de l' kilometro kun antaŭirado en 20 s. Tri kilometroj en unu minuto! 180 km. en unu horo!!

Mi neniam forgesos la eksterordinaran impreson faritan al mi de tiu potencia ilego.

Nur unu el ĝiaj cilindroj sufiĉus por treni pezan veturilon turisman kaj la tuta maŝino, devige, povas pezi nur 1000 kilogramoj, laŭ la regularo internacia de la automobilismaj federacioj. El ĝiaj ok tuboj por elpeli gasojn brulitajn spruĉas ok langoj el fajro kaj fumo. La motoro resonas kaj krakas per sono neta, regula, meze de la silento de l' mateno. Nur ankoraŭ dek sekundoj... nur kvin... Foriru!... Guinness levas la piedon de la pedalo de kunligo de l' motoro kun transmetilaro. Kaj, en raŭkego, flekse saltas la monstro! Kiel kuglego ĝi alvenis al celo, kaj delire la popolamaso aplaudas tiun novan venkon kontraŭ la tempo.

En la kategorio de malpezaj veturiloj (400 ĝis 500 kilogramoj) *Leon Molon* (*Gladiator*) kaj *Villemain* (*Bayard-Clement*) sukcesis trafi bonan rapidecon.

En veturiletoj (malpli ol 400 kg) oni rimarkis *Barriaux* (*Vulpes*). En motorcikloj (malpli ol 50 kg.) niaj konatuloj *Cissac* kaj *Giuppone* (*Peugeot*) suriras la kilometron sur siaj iloj en 28 s. (128 km. 500 hore).

En turismaj veturiloj citindaj estas *Sizaire-Naudin*, *Chenard-Walcker*, *Bolide*, *Tourand Motobloc*, *Darracq* k. t. p. la turismaj motorciklo kaj tri-karo *Quentin*.

## Kurado dum unu kilometro sur deklivo ĉe GAILLON

(28<sup>an</sup> DE OKTOBRO).

La veturiloj turismaj kurantaj ĉe Dourdan estis devigataj ree kuri ĉe Gaillon unu kilometron kun antaŭa irado sur suprendeklivo po 10 %. Nur kelkaj kuraj iloj ne estis samaj.

*Demogeot* (*Darracq*) sur veturilo 650 kg-a, supreniranta la deklivon de Sainte-Barbe ĉe Gaillon je 124 km. *Cissac* (*Peugeot*) kaj sia motorciklo je 130 kaj *Lee Guinness* (*Darracq*) glutanta la vojon je 144 km. hore kaj malpli grandiganta la rekordon je 4 sekundoj! Oni pensas revi!

Tiu kurado estis sukceso por nia kunfrato « L'AUTO. »

## Origny Sainte Benoit.

(4<sup>an</sup> KAJ 5<sup>an</sup> DE NOVEMBRO).

La kurado sur 2 km. da vojo miksa (1 km. sur deklivo sekva de 1 km. sur ebenaĵo) organizita de la ĵurnalo « LES SPORTS » apud St. Quentin bedaŭrinde ne estis favorata de l' vetero. La unuan tagon, la turistoj devis kuri sub malagrabla pluvo kaj estis necese prokrasti ĝis la morgaŭa tago la elmontron de la kuraj veturiloj.

Inter turistoj ni citu la veturilojn *Rochet-Schneider*, *Pipe Martini*, *Ariès*, *Sizaire* kaj *Naudin*; ankaŭ la gracion motorcikleton (kun cilindra enhavo nur 1/3 da litro) *Quentin*.

Inter la kuraj veturiloj, la vera sportviro *Lee Guinness* sur sia legenda 200 mĉ. *Darracq* estis la unua laŭ sia kutimo. Li venis speciale el Anglujo, profitante la liberan tempon de l' Dimanĉo, por kuri en Francujo. Jen tute inda agado! Meza rapideco 119 km. 620 en horo. Sur motorcikloj la neevitebla *Cissac* sur sia fidela 16 m. ĉ. *Peugeot* sukcesis trafi ĝis 96 km. hore. Sur malpezaj veturiloj *Villemain* (*Bayard-Clement*) kaj sur veturiletoj *Vivet* (*Darracq*) faris interesplenajn iradojn.

## Pokalo de la Veturiletoj.

(6<sup>an</sup>-12<sup>an</sup> DE NOVEMBRO).

Per ses kuradoj, en kiuj ili devis atingi mezan rapidecon je 30 km. hore, tiuj interesaj malpezaj veturiletoj provis sian taŭgecon por la komercistoj, kuracistoj, makleristoj, k. t. p. Ili ne estas karaj, konsumadas tre malmulte da petrolesenco, ne konas la « panne » (esprimo franca: halto nevola) kaj elmont-ris, ke ili povas iri tra la plej malsekaj veteroj. La venkanto estis la veturileto *Sizaire* kaj *Naudin*, kiu atingis la lastan tagon la 233 km., nur en 4 h. 05 m. kun malgranda motoro 10 m. ĉ.-a.

L. DE GUESNET.

*Vidu « Ciklismo » sur la 3<sup>an</sup> paĝon de la falsa kovril.*

## Nevundigebla homo.

Je pli homo riskas sian vivon en mil danĝeraj sportoj, des pli li bezonas antaŭgardi sin kontraŭ ĉiuspecaj kontuzoj, vundoj, disrompoj kaj aliaj difektaĵoj.



NEVUNDIGEBLA HOMO.

Liantaŭenflugas sur biciklo kaj en kapturnigema veturado sur aŭtomobilo, li traveturas sur la fervojo interspacojn dum mallonga tempo kaj eĉ ne kontentiĝas pri tiu rapideco.

Ankaŭ okazas ofte ke la rapideco estas tro granda, kaj tiam la singardulo alvenas sub-supren, kaj stariĝas sinege vundita, setamenli ankoraŭ povas starigi sin.

Tial oni pripensis multe da rimedoj por antaŭgardi la diferentajn korpartojn kontraŭ la fortaj ekpuŝoj.

La apuda bildo montras unu el tiuj rapidecheroj: lia kapo estas protektata per kasko,

liaj genuoj per kaŭĉukaj, per aero plenigitaj, kusenoj. Baldaŭ sekvos pneŭmatikaj brust-kaj brakplatoj!

AMATUS esperantigis.  
E! De Lusthof (Belgujo).

# Knabina vivado en Japanujo

Speciale por « Tra la Mondo ».



S<sup>ro</sup> K. KAWAJI.

*Japana inspektoro de la lernejoj  
de la insulo Awaji.*

libertempon. Sed religiaj festoj, ĉu buddistaj, ĉu kristanaj, ne koncernas la japanajn lernejojn; dimanĉo estas libertempa tago, ne pro ia religia kaŭzo, sed simple pro la praktikeco ripozati unu tagon de la semajno. (Same ĉiuj ŝtatoŝefoj, bankoj, kaj la plimulto de la privataj grandaj oficejoj — sed ne la vendejoj — ripozas la dimanĉojn). Ĉar la religio estas rigardata en Japanujo kiel tute privata afero, ĝi ne estas priinstruata en la japanaj lernejoj, sed multaj el la japanaj instruistoj (ekz. la ĉefo de la priskribata knabinlernejo, S<sup>ro</sup> Kawaĵi) estas kristanoj, ankaŭ multaj el la lernantoj. Anstataŭ religion oni lernas etikon, kaj por la praktika vivo la rezultato ŝajnas esti bona. Estas tamen permesite starigi privatajn lernejojn, kie oni povas instrui ian ajn religion, se alie oni konformas al la ordonitaj kondiĉoj.

Fotografajo N<sup>o</sup> 1 prezentas la ĉefon de la ĉi tiea knabina altlernejo, S<sup>ro</sup> K. Kawaĵi, kiu ankaŭ estas la inspektoro de la lernejoj de la insulo Awaji. Li naskiĝis en la 1845<sup>a</sup> jaro kiel filo de fama diplomatiisto, pri kies historio li mem verkis grandan, tre interesplenan libron; dum sia juneco li estis ano de komisiono sendita de Mikado por studadi alilandajn aferojn; li do vidis la plej grandan parton de la civilizita mondo; kompreneble li bone konas la anglan lingvon, kaj nun li treege interesiĝas pri Esperanto.

Fotografajo N<sup>o</sup> 2 prezentas la antaŭan eksterajn de la lernejo. La plimulto de la japanaj lernejoj estas konstruitaj preskaŭ tute laŭ la sama maniero: grandaj lignaj konstruaĵoj sen iaj arĥitekturaj ornamoj, kun vastaj, altaj ĉambroj kaj grandaj, multnombraj vitraĵoj — do tre higienaj, sed ne belaj domoj; sed la priskribata lernejo estas la domo de jam mortinta japana nobelo, kaj do prezentas multajn arĥitekturajn kaj aliajn belaĵojn ekstere kaj interne. En la antaŭa ekstera muro (kiel montrate de la fotografajo) estas papero anstataŭ vitro en la fenestroj laŭ la ordinara japana kutimo, sed en la aliaj fenestroj estas vitraĵoj, kiel ĉe en la japanaj lernejoj.

*Originalo de  
C. STEENBUCH (Japanujo).*

*Daŭronla.*



Oni legos interese, ke estas nun presita lernolibro Esperanta per la japana lingvo, verkita de S<sup>ro</sup> Hasegawa.

En nia venonta numero, ni donos kuriozan pruvon de niaj progresoj en Japanujo.



KNABINA JAPANA LERNEJO EN SUMOTO.

# La Modo,

de ROKSANO.



El « *Le Journal des Modistes* »  
(*Jurnalo de l'ĉapelistinoj*)  
16, rue Vivienne, Paris.

mas kvar pecojn. La antaŭa parto, oblikve tondita, estas pli mallonga ol la ceteraj; ambaŭ flankoj falas sur la orelojn, la mallantaŭa kliniĝas al la nuko, sur grandega banto el tre larĝa rubando. Jen sur la maldekstra flanko estas bela birdo, jen antaŭe, dekstre kaj maldekstre, estas tufo el floroj.

La ĉapelo montrata estas el kaŝtankolora felto, sur kies rando estas zibelo. Ĝi estas ornamita per veluro, plumoj de struto kaj kamelioj. La ĉapo estas el felo; la birdo havas nuancitajn flugilojn.

Ĉar mi kutimas plenumi ĉiam miajn promesojn, mi tuj parolos pri la feloj.

Kompatinda, kompatinda bolero, kiu tiel forte ĉarmis nin dum la antaŭa sezono, kun multege da bedaŭro al vi ni diras adiaŭon — aŭ sendube ĝis revido. — Sed kion fari? Tion postulas la Modo; ĉar la mallonga fela jako detronis vin. Tiu ĉi venkinta jako tute ne ĝustalfarita, finiĝas ĝuste ĉe la talio, kaj estas plibeligita de brodaĵo aŭ pasamento.

Alia kreaĵo estas la granda mantelo el astrakano, kies dorso estas tiel oblikve tondita, ke malsupre ĝi multe plilarĝiĝas.

Kelkaj felaj vestoj havas duonan manikon; sed tio estas nesaĝa kaprico de la Modo; kaj tial ke la felo havas kiel celon varmigi nin, la longa maniko, pli logika, estas aprenita de la plimulto da laŭmodulinoj.

La kravatoj el ermeno, mustelo, k. c. estas ankoraŭ modaj, kaj se ili ne estas tiel supere elegantaj kiel la stolo (1), ili havas la meriton protekti nian kolon ĉar oni ligas ilin sub la mentono, dum la stolo, kiun oni jetas sur la dorson kaj la brakojn, celas nur « ornami » elegantulinon.

## AL MIAJ SAMIDEANOJ.

Ĉu vi scias, ke la Amerikanoj impostas la altforman ĉapelon, kaj ĉu vi ne intencas imiti ilin kaj helpi al la forigo de tiu kontraŭestetika ĉapelo, kiu malbeligas la plej belan el la « Adonisoj » kaj... kaj malaperigas la plej densan hararon? La Modo, kiu ĉiam kreas por ni admirindajn novaĵojn, — jes, jes, kion ajn vi pensas pri tio — devus vere naski belvidiĝan ĉapelon por tiu aminda duono de l'homa gento. — Rimarku, sinjoroj, ke mi diris *aminda*, kaj ne *afabla*, kaj klinu vin tre, tre malsupren.

Korvarmege vi sendube dankas tiun karan Modon, kiu denove permesas, ke vi kisu la manon de la adorinda sekso. (Mi diras *adorinda*, tial ke se mi uzus pli malfortan esprimon, vi nepre pensus, ke mi estas tro multe modesta, ne alskribante al ni la adjektivon, kiun ni meritas pro multaj kaŭzoj). Senutile estas aldiri, ke *kiel vi* ni benas la reaparon de tiu ĉarma kutimo.

ROKSANO.

## Mallonga korespondado.

Tro malfeliĉa. — Ho! ho! vi malĝojegas pro tiuj tempiaj sulketoj; sed uzu do « la pâte Archœa », (pharmacie Levannier, 57 rue s<sup>te</sup> Anne, Paris) kaj vi miros pri ĝia rapida rezultato.

S<sup>no</sup> F. (Berlin). — « La pâte des Prélats » (parfumerie exotique, 35, rue du Quatre septembre, Paris) blankigas, glatigas la manojn kaj evitas la fendetojn, kiujn vi tiel forte timas.

Blondulineto. — Dankaron pro via multfabla letero. — La gantoj de la firmo Glénat (13, rue du Helder, Paris) estas treege rekomendindaj. Mi estas certa, ke ili vin kontentigos.

Per la revuo mi ĉiam respondos la demandajn leterojn enhavantajn 25 centimojn, kaj private tiujn enhavantajn 50 cent. Skribi al « Roksano » 1, rue Andoquet, Béziers, (France).

R.



El « *Le Journal des Modistes* »  
(*Jurnalo de la ĉapelistinoj*)  
16, rue Vivienne, Paris.

(1) France : étole — angle : stole. — hispane : estola,



Oni sciigis pri tio ĉi suprajn potenculojn regnestrarajn. Gurujon estis sendata, por ekzameni popolon, helpanto de l' Kaŭkaza vicreĝo, sultano Krim — Girej : li havis komunikojn kun popolo kaj proprokule ekvidis fruktojn de laborado de l' social-demokratoj : popolo malkaŝe avizis lin, ke ĝi kune kun Ruslanda proletariato celas demokratian respublikon. Gurujo estis proklamita en milita stato kaj en ĝin estis alsendita militistaro sub komando de sangavida generalo Alihanod por batalo kontraŭ « interna malamiko ». Popolo ĉion tion ĉi renkontis plej trankvile k. malvarmsange, daŭrigante sin okupadi je propraj aferoj. La brava generalo vane atendadis sangverŝon, arestis 12 inteligentulojn, sendis telegramon kun sciigo, ke Gurujo estas humiligita k. forveturis ree kun siaj soldatoj, kiuj tamen havis tempon por amikiĝi kun la popolo, k. ellernis kanti Marseillais'on. Arestitoj baldaŭ estis liberigitaj. Bojkoto de regnestraraj institucioj daŭris. Popolo kutimas al sinregado ; kreiĝas demokratiaj organizacioj. Vilaĝo dividiĝas je rondetoj ; en rondeto estas 10 homoj. Ĉiu rondeto elektas unu vilaĝan prezentanton. La prezentantoj de vilaĝoj elektas societatan prezentanton. Ĉiuj lastaj siavice elektas regionan prezentanton. Gurujo estas dividita je 7 regionoj, sekve en ĝi estas 7 regionaj prezentantoj ; sammaniere estas aranĝitaj ankaŭ partiaj organizacioj (de Rusl. Soc. Demokratia Laborista Partio). La prezentantoj de regionoj formas Gurujan Komitaton. Ekzistas ankaŭ societaj organizacioj k. vilaĝaj, kiuj formas interregionan kunvenon, kies komitato estas organo plenumanta.

Formo de juĝo — arbitracia. Decidon de arbitraciaj juĝistoj oni legas en popola kunveno, kiu havas rajton aprobi aŭ ne la aljuĝon. La plej alta certigo estas bojkoto. Bojkotata persono estas izolata de ĉiuj ; kun ĝi neniu povas havi ian aferon. Estis kelkaj okazoj de forsendo de krimulo el Gurujo.

Spionoj formas escepton (tre maloftan) : ilin oni mortigas.

Jen estas, laŭ ĝenerala rigardo, ĉio tio, kio tiel maltrankviligas niajn regnestrarajn satrapojn kaj ĝojigas niajn amikojn.

Oktobra ĝenerala politika striko en Ruslando atingis ankaŭ Gurujon, kiu ne volis resti indiferenta rigardanto de fariĝinta granda okazintaĵo kaj aliĝis al ĝi 15/28 de oktobro, Gurujo izoligis de l' tuta mondo Estis eksplodigitaj ĉiuj fervojaj pontoj, estis difektita telegrafo, k. sur limoj de Gurujo oni starigis patrolojn, kiuj haltigadis regnestrarajn kurierojn. Oni faris atakon kontraŭ policejo, senarmigis policajn gardantojn k. arestis policajn suproficiston. En ĉiuj lokoj estis senarmigataj policaj postenoj. Distriktestro kun roto da kozakoj elrajdis por liberigi arestitan polican suproficiston. Estis farata atako kontraŭ distriktestro, kies rezultato estis 90 kozakoj mortigitaj ; k. ceteraj estis kaptataj. Estis decidite ataki urbon Ozurgeti por senarmigi batalionon da kozakoj sin trovantan tie, sed socialdemokratia organizacio admonis popolon ne fari tion ĉi. Je sama tempo unu el social-demokratiaj partianoj piedirinte el Batum liveris caran manifeston atestantan pri unua venko de ruslanda proletariato. Kompreneble ĝi ne estis tio, kion celis ruslanda strikinta proletariato, sed ĝi faris grandan impreson kaj estis decidate ĉesigi strikon.

Voronzod — Daŝkod, vicreĝo de Kaŭkazo, rememoris pri Alihanod kaj kozakoj. Ilin oni direktis Gurujon. Sed Gurujon memoris ankaŭ proletariato. Gurujon memoris ankaŭ Postkaŭkaza vilaĝanaro. Ili persiste k. obstine postulis revenon de Alihanod, k. la brava generalo jam duafoje revenis en la ĉefan stabon de Kaŭkaza Milita Regiono.

Por « TRA LA MONDO » *esperantigis.*

D. M. K. Rusujo





## Gül-Baba

Hungara Legendo, de BELA TOTH kaj AD. ALTENBURGER (Hungarujo).

Li estis sanktulo kaj poeto, kaj li ŝatis la rozojn. Tion sciigas la kroniko pri Gül-Baba, kies tombo estas en Budapeŝto (1), kontraŭ la Margaretaponto sur la Rozomonteto, en malgranda moskeo, kien ankoraŭ nuntempe almigradas kelkaj pilgrimantaj dervişoj. La tradicio jenon rakontas pri Gül-Baba:

Tiu ĉi elektito de Dio kaj de lia profeto devenis de Balsora, en Mezopotamio, kie li vendis parfumaĵojn en la bazaro. Li estis nomita Halil-ben-Said, poste li perdis tiun nomon, kaj oni lin nomis Gül-Baba, tio estas: patro de la rozoj.

La profeto mem estis granda ŝatanto de ĉiuj bonodoroj, kaj diris ke la elspiraĵo de la rozo, jasmeno kaj hiacinto, estas muta preĝo; kaj la idoroj, laŭdado al Dio. Do Halil bone faris, kiam li vendis ĝustapreze la rozoleon al la kredantoj.

Sed la koro de la bona Halil suferis, ĉar li ne povis esti tiom malavara, kiom li deziris. Li malĝojis precipe, tial ke li povis vendi la guton de la rozoleo nur por ormonero, kaj ke, tiel, la malriĉuloj neniam povas ĝin aĉeti.

Ian matenon, la butiko de Halil ne malfermiĝis: Vojiranta kamelo estis pentrita per ruĝa tero sur la kaduka pordo. Tio estis signo, ke la dommastro estas forpeligimanta al Mek'o. Tio estis vera. Poste, de tie, li pli malproksimen iris, jen piedirante, jen ŝipveturante, kaj alvenis apud Balkan-montaro en la Kazanlik'valon, kie la oleodonantaj rozoj disvastiĝas kiel ruĝa maro.

Said estis devigata elporti multajn malagrablaĵojn ĝis kiam li povis, sen la scio de la Bulgaroj, spionante, ellerni la grandan sekreton: la faradon de la rozoleo. Kvarspecaj rozoj estas en la nobela Kazanlika rozfamilio. La unua estas malhela, preskaŭ nigra: tiu ĉi estas la patro, ĝi donas la forton; la dua estas delikate ruĝa kun odoro tre dolĉa: tiu ĉi estas la patrino, ĝi donas la bonecon; la tria estas sangokolora, kaj eĉ fendiĝas pro pleneco: tiu ĉi estas la filo, ĝi donas la plezuron; la kvara estas pala, preskaŭ blanka: tiu ĉi estas la filino, ĝi donas la ĉarmon. Tiuj ĉi kvar bonegaj ecoj kunmiksiĝas en tiu agrabla parfumo.

Ian aŭtunan matenon, Halil ne restis plu sur la grandaj montoj. La Bulgaroj traserĉis lin kruetele, malvolvis ankaŭ la vualon de lia turbano, kio estas granda malpiegaĵo, eĉ ili disŝiris la plandon de liaj sandaloj por ekscii, ĉu li ne ŝtelis rozsemojn el ilia trezoro ĵaluzeme gardata. Dum ili tiel traserĉis, la sankta viro pie laŭdadis, per sia dikperla rozario, la eternajn virtojn de Allah. La serĉantaj Bulgaroj ne pensis pri tio, ke la perloj de la rozario estas interne kavaj kaj plenaj je la semo de la karegaj rozoj.

Poste la bona Halil-ben-Said aliris Budon (2) kun sia trezoro. Tero surverŝita per sango estas agrabla al la rozoj; la tero de Hungarlando estis do vere taŭga. Baŝao Mehemed Sokoli, guberniestro de Budo, aŭdinte kian pian laboron la fremdulo, kiu venas de malproksima lando, volas komenci, apartigis por li belan terpecon. Li donacis al li la monteton, kiu, ĝis nun estas nomata la Rozomonteto. Tie Gül-Baba plantis siajn karajn rozojn kaj zorgis pri ili.

La pia ĝardenkulturo havis jam multajn malamikojn je la tempo, kiam vivis Gül-Baba. Oni vane ĉirkaŭis tiun novan rozlandon per altaj ŝtonmuroj; ĉiam la rozoj, kiam ili malfermiĝis, tuj malaperis. La hungaraj kaj turkaj junuloj el Budo, ne povinte satigi je la beleco de la rozoj, ilin ŝtelis.

Gül-Baba tre malĝojis pro tio. Baŝao Mehemed Sokoli tre koleris, kaj per trumpetantaj anoncantoj, kaj komunumaj tamburistoj, sciigis publike al la Turkoj, kaj al la Hungaroj, ke ĉiu, kiu kuraĝus ŝteli eĉ unu rozotrunketon, estus senkapigita.

Kiam vesperiĝis ĉe la akva urbo (3) turka, hungara junulo pripensadis apud la fortikigita pordego, kiel li povos, per ruzo, ekapti rozojn el la ĝardeno de Gül-Baba, ne ricevante tamen domaĝon.

Samtempe turka junulo jene meditis: dum mi eniros, mi metos hungaran ĉapon sur mian kapon; se mi poste remetos sur mian kapon mian turbak'on, kiu rekonos min?

La hungara junulo decidis: Mia surtuto estas sufiĉe longa, ĝi simiĝas al turka kaftan'o, se mi ĉirkaŭas mian kapon per batista tuko, kiu, surprizante min, kredos ke mi ne estas turko;

se mi do deŝiros la batiston, kiu povos ĵuri ke mi estas la ŝtelinto. Ho Ve! Malbonan sukceson ricevis lia saĝo!

Li jam malsurrampis la deklivon de la monto, kunportante sur la ŝultro la tornistran plenan je rozoj, kiam li aŭdas, ke, de malproksime, egalaj paŝoj akompanas lin. Rapidi al proksima strateto, kaj ĵeti la tornistran en puton, tuj okazis. Sed vane li ĵetis siajn rozojn en la puton, kaj vane malkonfesis la ŝtelon, antaŭ la ĉaŭŝoj (4) kiuj estis rapide atingintaj lin. Ili arestis lin, kaj kondukis lin matene al la Baŝao.

« Kiu do ci estas, sentaŭgulo? diris la Baŝao. Mi aŭdis de la maljuna ĉaŭŝo Ahmed, ke ci ne nur estas ŝtelisto, sed ankaŭ ruza hipokritulo! Ci estas laŭvole, vera kredanto aŭ ĝiaŭro, (5) turbanportanto, aŭ ĉapulo! Ve al ci, malpiegulo! »

— « Brilvizaĝa estro, la okuloj de la ĉaŭŝoj eraris », respondis la arestito.

— « Ne eraras la ekzekutisto! li tranĉos cian kolon. La procezo estas finita ».

Ĝi tamen ne estis finita; ĉar, posttagmeze, kiam la helpantoj de la ekzekutisto jam kunigis la ruĝajn trabojn de la eŝafodo, turka junulo venis en la Divanon (6) de la Baŝao kaj tie, antaŭ la kunigintaj leĝoscienculoj diris: « Tiu junulo hungara ne estas kulpa: ĝi estas mi, kiu ŝtelis, dum la antaŭa nokto la rozojn el la ĝardeno de Gül-Baba. Mi anstataŭigis mian turbanon per hungara ĉapo ».

La ĉeestantoj admiris tiujn parolojn, sed ili ankoraŭ plie miris, kiam oni estis kondukinta la hungaran junulon el la malliberejo, ĉar tuj kiam li aŭdis la diron de la turko li tuj ekkriis:

— « Li estas malprava, li mensogas! ĝis nun mi kaŝis la veron. Nun mi ĝin diras, mi metis sur mian kapon turbanon anstataŭ mia ĉapo; ĝi estas mi, kiu ŝtelis la rozojn! »

— « Ne kredu al li! — ekkriis la turko, mi anstataŭigis mian turbanon per ĉapo, ĝi estas mi, kiu ŝtelis la rozojn! »

Ĉiuj miregis, kaj ĉagrenege la Baŝao diris: — « Ne ŝercadu, junuloj! Kiu estas la hipokritulo? Kiu estas la ŝtelinto? Nu, aŭskultu min! »

— « Mi » — samtempe ekkriis la turko kaj la hungaro, kaj kvazaŭ unubuŝe, ili ambaŭ aldonis: « La morto de senkul-pulo ne premu mian animon! » Tiam fariĝis silento. La saĝaj sinjoroj konsiliĝis. Fine la Ulema (7) de la granda moskeo ekparolis sulkigante siajn grizajn brovojn:

— « Estro nia, grandpotenca Baŝao, mi diras, ĉio konsiderite, ke ili ambaŭ estas ŝtelistoj ».

— « Se ili ambaŭ estas ŝtelistoj, dehaku la kapojn de ili ambaŭ! » ekkriis kolerege la Baŝao.

— « La juĝo estas justa, o granda Baŝao! diris tiam Halil-ben-Said (Gül-Baba), justa laŭ la leĝo kaj la rajto. Via saĝa prudento ĉe tiu momento elparolis la juĝon, sed via bona koro ĝin ŝanĝos, se vi bone volos aŭskulti mian peton. Tiuj du junuloj, la turka kaj la hungara, se ili eĉ estis noktaj ŝtelistoj, tamen estas la plej honestaj junuloj, al kiuj iam la suno lumigis. Kiu do rajte povas vivi sur tiu ĉi tero, se ne tiu, kiu por la purega verdiremo serĉas la morton? Pardonu ilin Sinjoro! Mi, via maljuna kaj fidela servanto petegas ke vi pardonu al ili ».

Tiel parolinte, Gül-Baba fleksis antaŭ li sian tremantan genuon. Tiam la Baŝao repaciĝis, pardonis, kaj liberigis ilin.

Kiam ili, la manon en la mano, kiel du bonaj amikoj, eliris el la pordego de la palaco, Gül-Baba, tie estis kun du rozbukedoj grandaj kiel muelŝtono.


— « Akceptu junuloj, — li diris — tion mi donas al vi, ĉar hodiaŭ por la vero, vi riskis viajn kapojn. Allah estas mia atestanto, ke mi kolektis la plej belajn rozojn de mia ĝardeno, sed la rozoj velkos, mortos; jen estas iliaj animoj en tiu ĉi du boteloto da rozoleo. Eĉ post cent jaroj tiu odoro ne estos forfluginta, ankaŭ viaj nepoj povos rememori pri la malriĉa Gül-Baba! »

Jam de longe forflugis la odoro, kaj ankaŭ mortis la nepoj, sed vivas ankoraŭ la memoro pri Gül-Baba, kiu estis sanktulo kvankam li ne faris miraklojn, estis poeto kvankam li ne verkis versojn, kaj ŝatis la rozojn, kvankam kelkafoje li malŝparis ilin.

De la Hungaro BELA TOTH,

Tradukis AD. ALTENBURGER (Hungarujo).

(1) Tiam Hungarujo estis Turka provinco, en la XVI<sup>a</sup> kaj XVII<sup>a</sup> centjaroj. — (2) Budapeŝto konsistas el du partoj: Buda kaj Pesto. — (3) Porto de Budo apud Danubio. — (4) Turkaj gardistoj. — (5) Tiel la Turkoj nomas la kristanojn. — (6) Divano: Turka konsilantaro. — (7) Koran-scienculo.



LA ROCHELLE: GOLETOJ POR LA FIŝKAPTADO APUD « TERRE-NEUVE » (NOVA LANDO) KAJ ISLANDO.

## La Haveno La Rochelle

De SAM MEYER.

En antaŭa artikolo, nia distinginda kunlaboranto parolis pri la historio de La Rochelle. Hodiaŭ li donas kelkajn sciigojn pri la komerco de l' haveno kaj pri ĝia belega antaŭhaveno La Pallice.

La Rochelle estis iam unu el la ĉefaj francaj urboj per la industrio, komerco kaj marveturado. Tie troviĝis fajenco-kaj vitrofabrikoj, sukerrafinejoj, k. a.

Poste okazis en la lasta centjaro intertempo de malprospero, kaŭzita de la perdo de Kanado, de insulo Sankto Domingo kaj de aliaj kolonioj, kun kiuj la Roŝelanoj faris tre aktivan kaj profitan interkomercon.

Oni devis do konformigi sin al la novaj kondiĉoj truditaj de la cirkonstancoj kaj serĉi aliflanken kompencon por tiu perdo.

Antaŭ kelkaj jaroj oni kreis la belegan havenon de *La Pallice* je kvar kilometroj de La Rochelle. Tiu ĉi nova haveno, kun doko larĝa kaj profunda, povas ricevi eĉ la plej grandajn ŝipojn.

Apud la nova haveno baldaŭ konstruiĝis petrolrafinejo, ŝpino kaj kelkaj fabrikoj de gelateno kaj de hemiaj produktaĵoj.

Tiuj ĉi fabrikoj siaparte altiras multajn ŝipojn ŝarĝitajn je karbo, mineraloj, ostoj, kruda petrolo kaj kanabo, ne malhelpante la komercon de la

malnova haveno, kiu ankoraŭ nun kiel antaŭe ricevas la malpli grandajn ŝipojn kun karbo de Anglujo, ligno de Rusujo, Svedujo, k t. p., kaj multegajn barkojn de fiŝkaptistoj.

Ĉar la fiŝvendado restas unu el la ĉefaj komercaj fakoj de La Rochelle. Ĉiutage multegaj korboj da fiŝoj ekspediĝas al Parizo, Anglujo, Germanujo, Hispanujo kaj eĉ al la apudmaraj urboj de Italujo.

Ostroj, konkoj, salo mara, vino kaj brando de Cognac, kalko kaj cemento, ankaŭ estas komercaĵoj de la Roŝela vendajaro.

Laŭ la lastaj kalkuloj oficialaj, La Rochelle enhavas nun denove 30,000 loĝantojn, tio estas ĉirkaŭe la saman nombron, kiel en la epoko de sia plej granda prospero, antaŭ la sieĝo de 1627.

La komerco denove antaŭeniradas kaj ĉujare progresadas. Oni povas antaŭvidi por *La Rochelle* novan periodon de prospero, plene meritatan de la oportuneco de ĝia haveno, kaj de la laboremo kaj persisteco de ĝiaj loĝantoj.

SAM MEYER.  
el La Rochelle (Francujo).

# FELIETONO

## Poŝta Amo.

Hispana, de JOHANO MUNOZ KAJ PABO'N, Noveleto.  
Tradukita de JOHANO GARCIA MARTIN, el Ubeda (Hispanujo). (\*)

Al S<sup>ro</sup> Karolo Vergara, *Imagurbo*.

Ŝajnas, Sinjoro Gayarre, ke *via* malsano ne sidas en la intelekto, sed ĝi estas en la koro; kaj verege mi opinias ke volo tiel fortega kaj vivplena kiel la *via*, ne devus esti, fine, tiel malforta kaj malkuraĝa. Jen estas kelkaj enŝprucigadoj de vireco kaj energio. Estu grandanima, Karolo, kaj cin venku. Ci vidos kian grandan ĝojon alportos cia propra venko. Sed konfesu nur konvinkite. Mi ne volas cin ludilo, mi volas cin viro.

8, IX, 1905.

MARINJO.

Al Fino Marinjo Lasso, *Ajnvilaĝo*.

Ci venkis, Galileino!... Se *via* edzino petas ke vi deĵetu vin de tegmento, preĝu al Dio, ke ĝi estu malalta (1). Mi konfesos ne unu sed tri fojojn, se tio estas necesa, kvankam oni mokos min. Mi volas esti grandanima, kaj ŝpari nenian penadon. Ci ĝin meritas; kaj aliparte, se oni devas transpasi tiun riveron por edziĝi, tiamaniere mi penados eduki la palaton por la de mi deziregita okazintaĵo. Pro la cia profito, fraŭlino, alten!

10, IX, 1905.

KAROLO.

Al S<sup>ro</sup> Karolo Vergara, *Imagurbo*.

Pro la profito de cia animo; de tiu animo tiel bela, kiun ci al Dio ŝuldas, kaj kiu povas esti malbona nur en tia okazo, se ĝi trudas al si perforton. Ci estas esence bona, Karolo, kaj tre bona; ci vivadis malatentite, eble elvojĝinte kaj ci ne trovis pacon for de l' boneco, kiu estas la centro de cia animo. Cin lasu ĉiam konduki per la Dia puŝado. Neniam kontraŭstaru al ĝi: tute cin fordonu al ĝi: Dio al ci procentege pagos. Bonuloj cin ellaŭdos kaj ankaŭ cia korega,

12, IX, 1905.

MARINJO.

Al Fino Marinjo Lasso, *Ajnvilaĝo*.

Marinjo, sankta Marinjo, dia Marinjo, mia gardanta anĝelo, estu benita. Mi ĵus konfesis al la Pastro de « Santiago de Sevilla », kiu alvenis por prediki dum naŭ tagoj. Jen mi estas antaŭ ciam piedoj konvinkita kaj konfesinta... Se ci vidus, belulino mia, kiel granda estas mia ĝojo! Nur mankas al mi cia amo por esti tute feliĉa. Min amu kaj morto alvenu; mi ĝin ne timos plu se ĝi min ekkaptas havantan la Dian amikecon kaj apud ci.

14, IX, 1905.

KAROLO.

Al S<sup>ro</sup> Karolo Vergara, *Imagurbo*.

Kvankam ci estas tre feliĉa, Karolo mia, ankaŭ mi estas multe pli feliĉa. Mi havas jam du feliĉegojn. Unu estas tiu, kiun ci sentas men en cia konscienco,

kaj kiu ankaŭ plenigas mian aminon; la dua estas tiu kiun mi mem havas, tial ke mi estas haviginta ĝin al ci. Estu benita la horo, kiam mi decidis respondi cian unuan poŝtkarton. Kia granda feliĉo por mi esti kondukinta al Dio animon tiel belan kiel la cia! Mi estas pli kontenta ol...!

16, IX, 1905.

MARINJO.

Al Fino Marinjo Lasso, *Ajnvilaĝo*.

Nu do, mia Karulino, ĉar estas jam elsolvita tio, kion oni povus nomi teologia konflikto, ĉu jam alvenis la horo, en kiu ci donos al mi la deziregitan premion de miaj klopodoj kaj penadoj? Eldiru do, unu *requiescat in pace*, kiu kvietigos sur siaj venklaŭdoj tiun ĉi malbonan vunditon de cia amo. Cia ĉiama enamiĝinto,

18, IX, 1905.

KAROLO.

Al S<sup>ro</sup> Karolo Vergara, *Imagurbo*.

Mia malbona vundita amiko. Kiu diras « virino » diras « postulo ». Mi postulas de ci ankoraŭ plu; t. e. ke ci amu la bonecon pro la boneco mem, eĉ forlasante iujn ajn premiojn. Tio ĉi estas sindonema grandanimeco; alie agi estas maskovesta egoismo, kaj de animo kiel la cia oni povas peti la plenumigon de tiaspecaj postulegaĵoj. Tion mi nun pretendas. Ĉu ci neados la malpliaĵon, fordoninte sindoneme la pliaĵon? Respondu al cia sendecida,

20, IX, 1905.

MARINJO.

Al Fino Marinjo Lasso, *Ajnvilaĝo*.

Jes, virino: mi amas la bonecon pro ĝi mem kaj cin per mia tuta animo. Kion mi nun klare ne povas distingi estas ĉi tio: ĉu mi amas la bonecon ĉar ĝi korpigiĝis en ci, ĉu mi adoras cin tial, ke ci estas, laŭ mia opinio, la boneco enkorpiĝita? Estas certe, ke mi amas la bonecon sincere, kaj ke mi adoras mian Marinjon per ĉiuj miaj fortoj kaj sentoj. Ne estu, do, sendecida pli longe, kaj eldiru unu *Bes* kiu naskos la ĉiaman feliĉecon en cia,

22, IX, 1905.

KAROLO.

Al S<sup>ro</sup> Karolo Vergara, *Imagurbo*.

Nu, estas necese, Sinjoro, ke oni klarigu tiun ĉi demandon, tre gravan por mi. La boneco estas unu-aĵo, kaj alia estas mi. Ci min amis eĉ apartigante la bonecon. Ĉu ci sammaniere amas la bonecon nun, kiam ci min konas, eĉ se estus necese, ekzemple, forgesi min? Imagu ke, post ĉiuj *post'oj*, ne plaĉus al ci cia,

24, IX, 1905.

MARINJO.

(\*) Sekvo. (Vidu *Nejn Zan, Jan, han kaj San*). — (1) Popoldiro facile komprenebla de ĉiuj.

Al Fino Marinjo Lasso, *Ajnvilaĝo*.

Jes, ci plaĉas al mi. Mi ankaŭ penis haviĝi informojn pri ci, kaj nun mi scias ke ci estas mia idealo. Mi scias ke ci estas juna, honesta, pia, donema, bonfarema, anĝela! Pri kio jam mi ne povis sciigi estas ĉu ci estas blonda aŭ ne. Sed mi jam diris al ci, ke ĉu ci estas albinosa kiel la fianĉino de Hamleto ĉu brunega kiel tiu de Radames'o, cin adoras kaj deziregas cia ĉiama soifanto,

26, IX, 1905.

KAROLO.

Al S<sup>ro</sup> Karolo Vergara, *Imagurbo*.

Tre malsaĝeta sinjoro. Mi tute ne scias, kiu estas la persono, informinta cin pri mi. Se ĝi tiel bone min konas, kial ĝi ne diris al ci la koloron de mia hararo? Ĉu ne estas de ci imagitaj la perfektaĵoj kaj bonaĵoj, kiujn al mi ci apartenigas en cia lasta poŝtkarto. L'afero ja estas tre ĉarma. Mi restas plena je scivolemo kaj ankaŭ dankema pro flatfrazoj, kiujn ci malŝparas al cia,

28, IX, 1905.

MARINJO.

Al Fino Marinjo Lasso, *Ajnvilaĝo*.

Kiu min informis pri ci estas la pastro de Seville, al kiu mi konfesis miajn kulpojn, kaj kiun mi poste konfesis ĉe gastejo. Li *senintence* parolis pri Ajnvilaĝo, kaj mi *intence* demaudis ĉu li konas cin, kaj li ekparolis kaj diris mirindaĵojn pri ci. Li diras ke li ne estas turninta sian atenton al tio, ĉu ci estas blonda aŭ ne, tial ke li ne kutimas rimarki tiujn detalojn. Mi nescias kial mi imagas, ke ĉio tio estas ruzaĵoj de l' pastreto. Ĉu alvenis fine la tempo, kiam ci diros tion? Atendaute la « Sanktan Alvenon »....

18, VII, 1905.

KAROLO.

Al S<sup>ro</sup> Karolo Vergara, *Imagurbo*.

Estas io, kara amiko, multe pli grava ol la koloro de mia hararo kaj kion ci jam ne diris al mi. Ĉu ci amos la bonon pro la bono mem? Ĉu ci kuraĝos diri: « mi ĝin amus kvankvam Manjo estas perdita por mi? » Tiamaniere deziras koni la delikatecon de cia amo, cia tre postulema,

1, X, 1905.

MARINJO.

Al Fino Marinjo Lasso, *Ajnvilaĝo*.

Mi tute ne komprenas, kara Marinjo, kial ami la bonon pro la bono mem estas pruvo, kiu elmontras la delikatecon de mia amo al ci. Kial ne cin ami, apartigante la bonon, ĉar la boneco kaj ci estas malsamaj aferoj, aŭ kial estas pruvo de la delikateco de mia amo la forigado de mia amo al ci? Ambaŭ aferojn oni ĉerpas el cia poŝtkarto. Pro la najloj de Kristo, kiom ci havas sub la Damokles'a glavo la animon de cia,

3, X, 1905.

KAROLO.

Al S<sup>ro</sup> Karolo Vergara, *Imagurbo*.

Rigardu kaj atentu, Karolo mia: ami la bonecon pro mi estas nek ami min nek ami la bonecon; tio estas ami cin mem kaj deziri la bonecon kiel peron kaj min kiel kronon, kaj mi postulas la delikatecon, la voluptecon, la furioziĝon de la altanimeco ĉe l'amo, se oni permesas al mi tion diri. Jen kial mi ne fidus nek fidos al ci, dum mi ne trovos ĉe ci ĉiujn tiujn multenombrajn karakterojn de altanimeco

kaj sindonemo de ci mem. Ektuŝu tiun pruvŝtonon kaj sciigu min pri l' rezultato. Al ci kredos per cia parolo,

5, X, 1905.

MARINJO.

Al Fino Marinjo Lasso, *Ajnvilaĝo*.

Marinjo.... turmentantino de mia animo: ĉu ci volas la veron? Mi do diros la veron. Mi kredas ke mi amos la bonecon pro la boneco mem, kvankam mi estos devigata apartigi cin. Sed ne ekkaptu, mi petas, min je mia parolo, ĉar ci mortigus min. Kredu al mi: esti devigata cin perdi estus, sen kontraŭdiro, la plej granda el ĉiuj malfeliĉegoj! Se mi jam meritas jesan respondon, donu ĝin al mi. Tio ĉi estas neelportebla.

7, X, 1905.

KAROLO.

Al S<sup>ro</sup> Karolo Vergara, *Imagurbo*.

Mia tre estimata Karolo. Kiam oni estas alveninta Flandrujon ne estas plu Flandrujo (1), kaj la horo jam alvenis, kiam mi malfermos al ci mian koron. Mi amas cin, Karolo, per sama amo, kiel al ci estus havintaj cial gepatroj, sed mi... ne povas cin ami. Mi jam diris al ci en la komenco de nia interkorespondado, ke tio estas neebla. Ne insistu do. Lasu min, forgesu min.

9, X, 1905.

MARINJO.

Al Fino Marinjo Lasso, *Ajnvilaĝo*.

Sed pro kio? Kial, Marinjo mia, al mi, jam plibonigita kaj fariĝinta alia viro, ci neadas la « Paradizon de feliĉegoj », kiun mi songimagis por ci kaj por mi? Demandu, ordonu, postulu, sed amu min pro Dio. Pro tio Dio, Marinjo mia, kiun al mi ci konigis kaj igis min ami. Amu min aŭ mortigu min. Cia blinda,

11, X, 1905.

KAROLO.

Al S<sup>ro</sup> Karolo Vergara, *Imagurbo*.

Pro tiu Dio mem, mia bona Karolo, respektu mian sekreton. Neeble estas. Forgesu min kaj estu bona. Tio estas, kion lastfoje al ci postulas per tuta sia animo,

13, X, 1905.

MARINJO.

Al Fino Marinjo Lasso, *Ajnvilaĝo*.

Postulu de mi, Marinjo mia, ĉion krom cian forgesadon. Tio pezigus sur mian animon kvazaŭan malbenon, ĉar ĝi estas tute cia. Kaj aŭ ci diros ke ci min amas same kiel mi amas cin, t. e. pasie, freneze, eksterordinare, aŭ mi forveturos cian urbon por vidi ĉu miaj larmoj sukcesos tuŝi eĉ malmulte cian ŝtonan koron. Kompatu, Marinjo, kompatu min!

15, X, 1905.

KAROLO.

Al S<sup>ro</sup> Karolo Vergara, *Imagurbo*.

Sed kion plu mi povas fari, tre kara Karolo, ol diri ke mi tutkore amas cin? Pro Dio, ne alvenu tien ĉi. Ĉio estus vana Neeble estas. Sed ne kredu ke mi tion diras, tial ke mi timas cian alvenon. Neniam mi estis malkuraĝa. Mia koro estas tre hardita kontraŭ la batalo kaj tre kutiminta je la triumfo. Ke ci alvenu ne volas,

17, X, 1905.

MARINJO.

(Daŭronta).

JOHANO GARCIA MARTIN,  
(Hispanujo).

(1) Hispana popoldiro, signifanta ke, kiam oni trafis sian celon, ĉio finiĝis kaj klariĝas.

## Esperanto ĉe la Junularo (Sekvo).

Dum la kursoj por la instruistoj de 1<sup>a</sup> popolaj lernejoj Finlandaj — kiuj okazis en la Jyväskylä Seminario (16-27 de Septembro), — nia kunlaboranto, instruisto Samppa Luoma, faris Esperantan kurson en ok lecionoj. La entuziasmo estis tre granda inter pli ol 200 instruistoj aŭskultantaj, kaj oni konfesis ĝenerale ke instruistoj estas morale devantaj lerni la lingvon kaj fari el la afero koran aferon por si mem. (*El letero de S<sup>ro</sup> Samppa Luoma*).

Nia kunlaboranto R. Frenkel (Enisejsk, Siberio) intencas eldoni krestomation internacian por infanoj. Li deziras ricevi tradukojn en Esperanto el ĉiulingvaj infanaj literaturoj: rakontoj kaj rakontetoj, fabeloj, fabeloj, enigmoj, proverboj, ilustritaj rakontoj, k. t. p.

Oni bonvolu lin helpi kaj sin turni al li senpere.

Aperis nova eldono de « **Wörterbuch Deutsch-Esperanto** » Tiu ĉi vortaro, kiel klarigas la antaŭparolo, estas redaktita de D<sup>ro</sup> L. L. Zamenhof mem. Ĝi estas do tute atentinda pri la vortoj, kies radikoj ne estas troveblaj en la aliaj ekzistantaj vortaroj. Ni kredas scii, ke nia lerta kunlaboranto kaj amiko, Pr. Christaller, partoprenis en la laboro. Al li parton de la komplimentoj ŝuldataj al la zorgplena eldono. (2 fr. 25, ĉe Esperanto Verlag Möller & Borel, Prinzenstr. 95, Berlin, Deutschland).

Je tiu okazo, ni signalu ke « *La Revuo* » sciigas, en sia 3<sup>a</sup> No (Oktoebro), ke ĝi uzos nur, ĝenerale, la radikvortojn troveblajn en tiu vortaro. Kaj kiam ĝi estos absolute devigata (ekz. por teknikaj vortoj) uzi novajn radikojn, ĝi zorge konigos ilian tradukon diverslingven.

Plezure ni vidas, ke nia nova kunfrato alkonformiĝas al la konduta-regulo kiun ni mem elektis, kaj al la opinio eldirita de nia ĉefredaktoro en « *Lingvo Internacia* » dum ĝentila plumdisputo kun nia majstro.

T. L. M.

# MIKSAĴOJ.

## Konkursoj kaj Premioj (Sekvo)

### Solvoj de 1<sup>a</sup> Problemoj (unua kvaronjaro 2<sup>a</sup> jaro).

#### PROBLEMO 1<sup>a</sup>

Kalk + an = kalkan'	}	PM
pap + er = Paper'		
+		
lin + um = Mulin'		
vel + in = nivel'		

#### PROBLEMO 2<sup>a</sup> (nuligita)

#### PROBLEMO 3<sup>a</sup> oni — ino.

Mi akceptis ankaŭ ni — in'

Divenis (la ciferoj metitaj post la nomojn rilatas la numeron de la solvitaj problemoj).

Warden	1	3
Finot		3
Bastoul		3

Warden gajnis la unuan premion: 90 kartojn: T. L. M.

Bastoul la duan Finot la trian: 20 kartojn: T. L. M.

Ili estas petataj diri al mi kion mi devas fari per aŭ pri la gajnaĵoj.

Ch. BRUNET.

9. Boul. Victor Hugo, Bordeaux.

CHARLES MENDEL, ÉDITEUR  
118, Rue d'Assas, PARIS.

### FOTO-REVUO INTERNACIA

A BONOJ: Jare 5 Frankoj. — 1 Numero aparte 0.50.  
estas la ĉiunmonata resumo de

**PHOTO-REVUE**

Journal des amateurs de Photographie.

— QUI PARAIT TOUS LES DIMANCHES —

ABONNEMENTS :

FRANCE 6 FR., ÉTRANGER 8 FR.

por haviĝi rilatulojn en fremdaj landoj, aŭ por dokumentiĝi: ni rekomendas ankaŭ tiujn anoncetojn al la grupestro dezirantaj interrilatiĝi kun fremdaj samideanaj grupoj, kaj al la Esperantaj profesoroj, kies studentoj deziras trovi fremdajn korespondantojn por perfektigi en la lingvo per la internacia interkorespondado.

## TARIFO DE NIA PUBLIKIGADO.

Prezo je la linio	{ ANONCOJ: } (33 literoj)	Por unu anonco:	0 fr. 75 ĉiulinie.
		Por 3 anoncoj almenaŭ:	0 fr. 60 —
Prezo je la linio	{ REKLAMOJ: } (50 literoj)	Por la tuta jaro:	0 fr. 50 —
		2 fr. 50 ĉiulinie.	

Prezo je la paĝo (1 paĝo = 432 om. kv.)

	1 paĝo	1/2	1/4	1/8	1/16
Por unu anonco:	100 fr.	58 fr.	32 fr.	18 fr.	10 fr.
Por 3 anoncoj almenaŭ:	80 fr.	46 fr.	26 fr.	15 fr.	8 fr.
Por la tuta jaro:	50 fr.	30 fr.	16 fr.	9 fr.	5 fr.

Sendi la tekstojn kun la menda kosto al « *Tra la Mondo* », Meudon (S. & O.) France, antaŭ la 10<sup>a</sup> de ĉiu monato por la numero eliranta je la fino de 1<sup>a</sup> monato.

### NE KOMERCAJ ANONCETOJ

1,25 fr. por 4 linioj enhavantaj ĉiu 33 literojn minimume. Ĉia plua linio komencita kostas 0, fr. 25.

*Pro la dislegado de « TRA LA MONDO » EN LA TUTA MONDO, tiuj anoncoj malkaraj estas tre rekomendataj al la multaj filatelistoj kaj poŝtkartaj kolektistoj; pli ĝenerale al ĉiuj kolektistoj kaj al ĉiuj dezirantaj uzi Esperanton*

## Ciklismo.

### Kurioza kurado.

La 21<sup>an</sup> de Oktobro okazis ĉirkaŭ St. Etienne (Francujo) kurado ciklista enhavanta intereson per si mem tute karakterizan. Ni volas paroli pri la *Ĉirkaŭo Velay-Forez*, 222 km. sur la krutaj montoj de 1<sup>a</sup> Vivarais. Tie konkuris duspecaj kuristoj: la kuristoj metiistaj sur kuraj maŝinoj tute malpezaj, simplaj kun nur unu rapidumo, kaj la kuristoj nemetiistaj preskaŭ ĉiuj sur maŝinoj posedantaj sistemojn por anŝi rapidumojn. Nia amiko J. Dupuy, nemetiisto, alvenis unua. Li rajdis maŝinon konstruitan de nia simpatia samideano S<sup>ro</sup> de Vivie. (ĉefredaktoro de 1<sup>a</sup> teknika kaj cikloturisma revuo « *Le Cycliste* », fervora por Esperanto). Ni mem rekomendas varme la biciklojn kun ŝanĝilo de rapidumo, kiujn li zorgplene fabrikas, ĉar ni povis ŝati la taŭgecon kaj la perfektan konstruadon de tiuj maŝinoj.

Ĝen estas nova venko por ni, anoj de la ŝanĝiloj de rapidumo, la plej genia eltrovo ciklista.

## ALIAJ SPORTOJ.

Ni citu la manbatalajn defendadojn, kiuj okazis en Paris' en diversaj teatroj; la venkon de Angloj sur Francoj en luda kunveno pri piedpilko, kaj la mirindegan elflugadon de la aeroplano Santos-Dumont, kiu per sia sola forto altiĝis super tero kaj flugadis ĉirkaŭe 60 metrojn! kaj pli nune 260 metrojn!!

L. DE GUESNET.

### Lasthore.

La nomo de la oficiala organo de la « Amerika Esperantista Asocio » estas *Amerika « Esperanto »* *Jurnalo*. Sendube la unua kajero estos aperinta kiam eliros nia Decembra numero. (*El letero de S<sup>ro</sup> J. F. Twombly*).

Ferdinand Brunetière ĵus mortis. Tio estas grandega perdo por la franca literaturo. Ĝi estos sentata ne sole en Francujo sed ankaŭ fremduje ĉie, kie oni ŝatas la fortajn ideojn esprimatajn en vigla kaj bela oratora lingvo.

A. M.

# BIBLIOGRAFIO (SEKVO).

## La ĉefa verko de Doktoro Zamenhof.

« Fundamento de Esperanto » de L. L. Zamenhof devas esti la kunulo kaj gvidilo de ĉiu vera esperantisto.

Ĝi aperis dum la Boulogne'a kongreso kaj enhavas, en kvin lingvoj, la gramatikon kaj l'ekzercaron de D<sup>ro</sup> Zamenhof, kaj l'universalan vortaron, t. e. la Esperantan radikaron elpensitan de nia majstro kun traduko de l'radikoj en la lingvojn francan, anglan, germanan, rusan, polan.

Ĝi estas do la esenco de nia lingvo, la penso mem de ĝia genia elpensinto. Tio, la nomo, kiun la Doktoro donis mem al sia verko, montras sufiĉe ĝiajn valoron, atentindecon, kaj netuŝeblecon.

Cetere, en « Antaŭparolo » tute preciza, kaj kiu aldonas ankoraŭ al la merito de la « Fundamento », D<sup>ro</sup> Zamenhof proklamas tiun netuŝeblecon: « Neniu persono kaj neniu societo devas havi la rajton arbitre fari en nia Fundamento iun eĉ plej malgrandan ŝanĝon! »

Li mem ne permesis al si korekti kelkajn erarojn, kiuj sin trovis en la unua eldono de la « Universala Vortaro », ĉar, li diras, « se mi volus plibonigi, tio ĉi jam estus ŝanĝo, kiu povus kaŭzi disputojn kaj kiu, en verko fundamenta, ne povas esti tolerata. La fundamento devas resti severe netuŝebla eĉ kune kun siaj eraroj. »

La rajton, kiun li rifuzis al si mem, li donis al la Lingva Komitato kun la preciza tasko revizi la tradukojn de l'radikoj de l'« Universala Vortaro », inter kiuj kelkaj (tre malmultaj) estas neĝustaj aŭ neakordeblaj.

Pro tiu preciza celo, la neduba opinio ci ŝupre citita de nia majstro, mi estis tute surprizita ricevante, kiel ano de l' L. K., ĉirkuleron de l' Prezidanto de tiu komitato, pri aldono al la Universala Vortaro, celantan « ne sole korekti l' U. V. (per la forigo de la malĝustaj tradukoj enhavataj), sed ankaŭ ĝin plenigi per la aldono de la novaj radikvortoj ekzistantaj en diversaj aprobitaj vortaroj. »

Tio ŝajnas al mi tute ne akceptinda pro diversaj kaŭzoj:

La vortoj de l' naciaj vortaroj, kvankam aprobitaj, ne estas ĉiuj ekster kritiko; multaj estas naciismoj, ĉar la aprobo de D<sup>ro</sup> Zamenhof celis ĉefe la alkonformigecon de la vortaroj al la principoj de la lingvo kaj al la « U. V. ».

Tio estas tiel vera, ke en la « Antaŭparolo », D<sup>ro</sup> Zamenhof mem diras, ke la vortoj kiuj ne estas en la « Fundamento » « devas esti nur rekomendataj, ne altrudataj; oni devas ilin uzadi nur en la literaturo, ne en la korespondado, ĉar oni ne estus certa ke iu ajn adresato ilin nepre trovas en sia vortaro. »

Kaj li aldonas: « Nur iam poste, kiam la plej granda parto de la novaj vortoj estos jam tute matura, ia aŭtoritata institucio enkondukos ilin en la vortaron oficialan, kiel « Aldonon al la Fundamento ».

Ĉu, vere, oni pensas ke iam estas jam veninta! Ĉu la vortoj de l' naciaj vortaroj estas jam sufiĉe provitaj kaj maturaj, por ke la L. K., kiu havas siajn povojn de hieraŭ apenaŭ, donas al si la rajton enkonduki ilin en la « Fundamenton », kiu, laŭ sia esenco mem, devas esti neŝanĝebla?!

Stranga fundamento, kiu ŝanĝos ĉiufoje kiam oni faros novajn eldonojn de la nacia vortaro! Ĉar la vortoj de la jam presitaj naciaj vortaroj ne pli havas la rajton eniri en la « Universalan Vortaron » ol tiuj de la preparataj vortaroj ĥina aŭ ĥinda, aŭ araba, k. a.

La « L. K. » ne trograndigu: ĝi kontentigu sin plenumante, por la 3<sup>a</sup> kongreso, la precizan taskon donitan al ĝi. Ĝi donu al la Esperantistaro fundamenton ne plu havantan la kelkajn erarojn de la unua eldono.

Se ĝi volos fari plu, ĝi faros nenion seriozan, ĉar ne en kelkaj horoj, homoj eĉ plej laŭdinde intencantaj, povos fari pli bone ol nia majstro en la daŭro de longaj jaroj. Eble ĝi faros nenion pro manko da tempo, aŭ tial ke, kiam la laboro estos plenumata, oni ekscios pri baldaŭna apero de nova ajn nacia vortaro, kiun oni volos atendi por pliperfektigi la « U. V. »; kaj tiel, oni kredeble ne rapide antaŭenmarŝos!

La neduba rezultato de la farmaniero proponita de kelkaj membroj de l' L. K. kunsidintaj en Paris, estus senigi D<sup>ro</sup> Zamenhof de tio, kio restos en la estonto, ĝia plej bela glortito: Esperanto disvastiĝos, pliriĉiĝos — eble tro por sia ĉiama facileco — iĝos pli kaj pli — ĝis plena efektiviĝo — potenca rilatilo.

Pli kaj pli ankaŭ estos mirinde kaj admirende, ke tia rezultato estas verko de unu sola homo, eliris el sola cerbo, devenas de malampleksa libreto.

Ni konservu pie tiun libreton tian, kia ĝin donis al ni ĝia aŭtoro; la « Fundamento » de Esperanto estu ankaŭ la piedestalo de la Statuo, kiun ĉiu esperantisto starigas en sia koro por Zamenhof. Malgraŭ sia modesteco, tiu ĉi ne povas malhelpi tian starigon.

Ŝajnas al mi ke ni ne pli bone povas montri nian amemon al nia majstro ol donacante al li, por la 3-a kongreso, lian ĉefan verkon iom ĉizitan laŭ liaj permeso kaj direkto.

A. MONTROSIER,

Ano de l' Lingva Komitato.

« Fundamento de Esperanto », 2 fr. ĉe Hachette & Cie, Paris. Aĉeteblaj aparte: « Universala vortaro de la lingvo internacia Esperanto », 1 fr. « Ekzercaro de la lingvo internacia Esperanto » 75 c. Sama eldono.

« L'Héritage Klodarec », unuakta komedio originala en franca lingvo, de F. de Ménil.

S<sup>ro</sup> Georges Davignon, 1<sup>a</sup> oficisto ĉe Mastro Danfreville, notario, estus tute estimata de sia estro, se li ne tro ŝatus Esperanto'n kaj ne havus la gravan malpravon ricevi, en la oficejo mem, ridindajn Esperantajn gazetojn! Kaj Mastro Danfreville ne kaŝas al sia oficisto ke li forpelos lin, se li daŭrigas tion fari kaj okupi sin pri tute senutila kaj artefarita lingvo.

Nia heroo, Georges, tute ne deziras esti forpelata, ĉar li amas la ĉerman Marthe, filinon de l' notario, kaj li esperas edziĝi kun ŝi, kiu, siaflanke, lin rigardas sen malamo.

Sed Esperanto, kiu jam komprometis la aferojn de l' oficisto rilate la patron, kiu opinias ke lia oficisto tro flankklasas la aktaron de l' fama heredo Klodarec, naskas malfidon ĉe la junulino.

Aŭdinte siajn gepatrojn interparoli pri Esperanto, kiu malhelpas G. Davignon sufiĉe laboradi pri la notariaj aferoj, ŝi kredas ke la alloga Esperanto estas hispana teatra dancistino kaj faras riproĉojn al sia amatulo en ĉarma sceno, kiu finiĝas per klarigo de l' kiproko kaj Esperanta leciono per la verbo « ami ».

Sed la aferoj tute malboniĝas pro perfideco de Joseph, servisto, kontraŭ kiu Georges estis iom malafabla, kaj kiu triumfe alportas al la notario la ĵurnalon « Esperanto », adresitan al Georges en la oficejo!

Forpelita, Georges, reenirante por adiaŭi al Sino Danfreville kaj Marthe, alvenas ĝustatempe por vidi la embarason de l' notario, meze de l' geheredantoj de Klodarec, la Katalano Rafel Valles y Roderich kaj la Germanino Katharina von Knops, parolantaj kune malsamajn lingvojn!

La vorto Esperanto, eldirita de Georges, faras miraklon kaj la oficisto, iĝinte la savanto de Danfreville — ĉar la geheredantoj estas esperantistoj, — ricevas la manon de Marthe kiel dankateston de l' notario, kiu ne plu dubas pri la utileco de Esperanto. Tiu amuziga komedio tute taŭgas por la propagandaj festoj en Francujo. (75 cent.) Ĉe Hachette et Cie.

« Delmas'aj Helpaj Bildoj ». Multaj personoj konas tiujn bonegajn instruilojn por la fremdaj lingvoj. Ili konsistas el bildoj prezentantaj multajn scenojn kun ĉiuspecaj estaĵoj kaj objektoj, ĉiu signita per cifero. Kompreneble tiuj bildoj estas esence internaciaj. Sufiĉas doni, en la lingvo instruata kaj sur apartaj folioj, la nomojn rilatantajn la ciferojn. Tiel oni instruas per la *senpera metodo*, ne uzante la nacian lingvon.

Por helpi al la instruanto, « Klariga libreto » en la instruata lingvo donas tekstetojn, en kiuj troviĝas ĉiuj nomoj ĉi supre aluditaj kaj multaj verboj rilatantaj la agojn prezentatajn de la bildoj.

S<sup>ro</sup> de Beaufront, kies atento neniam dormas pri la propagando kaj instruado de Esperanto, komprenis la grandan utilon de tiuj amuzigaj instruiloj kaj li decidigis S<sup>on</sup> Delmas, la elpensinton, presi Esperantan eldonon de la « Helpaj Bildoj », kies tekston li verkis. Ni tre rekomendas la kajorojn: 1<sup>a</sup>, 2 fr.; 2<sup>a</sup>, 3 fr.; klariga libreto, 1 fr. 25 c. (Ĉe G. Delmas, pres-eldonisto, 10 Rue Saint-Christoly, Bordeaux, France).

## Lasthore.

De la 26<sup>a</sup> de Aprilo ĝis la 30<sup>a</sup> de Novembro 1907 okazos granda ekspozicio apud Jamestown, Virginia, U. Ŝ. de A., por rememorigadi la starigon ĉe Jamestown, en 1607, de la unua daŭra angla kolonio en U. Ŝ.

S<sup>ro</sup> C. Brooks Johnston, prez. de la estraro de la Jamestown Ekspozicio Kompanio sciigas afable nian redaktoron, kiel unu el la homoj plej favore konataj en la esperantistaro, pri la deziro de la kompanio kunvenigi tutmondan esperantistan kongreson en la ekspozicio; kaj tre ŝatinde, li demandas al li pri la plej taŭga dato por tiu kongreso.

Ĉar la afero interesas la tutan esperantistaron, S<sup>ro</sup> Montrosier estos danka al tiuj, kiuj — feliĉuloj! — povus ĉeesti la amerikan kongreson, sendi al li ilian opinionon.

# Esperanto internacia praktikilo.

## Esperanto ĉe la Scienculoj.

La « Internacia Scienca Sekcio » organizis, kiel ni ĝin diris en nia lasta numero, konstantan internacian oficon, kun la speciala celo zorgi pri la verkado de l' teknikaj vortaroj.

Tiu ofico, kies sidejo estas nomita « Internacia Scienca Oficejo », havas kiel direktoron S<sup>ro</sup> René de Saussure, posteulo de l' fama Horace Bénédicet de Saussure, kiu, la unua, supreniris la Blankan Monton; li mem eks-lernanto de l' franca politeknika lernejo kaj scienculo distinga, D<sup>ro</sup> fil., P<sup>ta</sup> D<sup>to</sup> ĉe la Genève Universitato.

Tiu ofico ne perdis sian tempon; kaj, laŭ sciigoj de S<sup>ro</sup> de Saussure mem, oni fondis en Genève komitaton de specialistoj, kiu havas jam ĉirkaŭe 30 anojn.

S<sup>ro</sup> de Saussure aldonas:

« Mi estis feliĉa eksci, ke vi malfermis sportan rubrikon en « Tra la Mondo » kaj baldaŭ havos kronikojn sciencan, artan kaj muzikan. Ni tiel povos, mi esperas, kalkuli vin inter la kunlaborantoj de Internacia Scienca Ofico, ĉar, kiam ni entreprenos la metodan ellaboradon de la teknikaj vortaroj kun la helpo de Internacia Konsilantaro, ni devos kompreni la nomon « Scienco » laŭ sufiĉe vasta senco por ke ĝi enspacu ĉiujn aplikitajn sciencojn kaj eĉ aplikajojn de la scienco al la industrio kaj artoj. Nia programo kredible enhavas la vortarojn pri arkitekturo, muziko, k. a., kaj ni povos eble ĉerpi el la materio kunigita de vi. »

## ESPERANTISTAJ KONSULOJ (Sekvo).

**Anglujo.** — *Plymouth.* — Konsulo de l' klubo: S<sup>ro</sup> J. A. Thill, direktoro de la « Instituto de Modernaj lingvoj », 6, Barton Cres.

*Malto.* — Konsuloj de l' klubo:

D-ro Gustavo Busuttill, L. K., 1, Xbiex Wharf, Misida.  
S-ro Vinc. A. Colombo, 16, Marina, Valetta.

**Aŭstrujo.** — *Praha.* — Konsuloj de l' klubo:

S-ro Josef Barvir, Praha II 1518.  
S-ro Jos. B. Novak, Praha II Zemská Banka.  
S-ro Vaclav Riegl, Praha II Moran 19.

**Belgujo.** — *Andenne.* — S-ro Melin, 24, Grand' Rue.

*Antverpeo (Anvers).* — S-ro Champy, 21, longue rue d'Hérentals; S-ro Leclercq, 11, Avenue de l'Industrie.

*Brugo (Bruges).* — S-ro Lekeu, 59, Rue des Bouchers.

*Bruselo (Bruxelles).* — S-ro Blanjean, 83, Rue du Collège, en Jaelles, (apud Bruxelles).

S-ro Béro, 139, rue Stéphanie, en Laeken (apud Bruxelles).

*Duffel.* — S-ro Ed. Van Uytven, greffier de la Justice de Paix.

*Huy.* — S-ro Wilmet, 43, rue du Marché.

*Lieĝo (Liège).* — S-ro Sloutzky, 24, rue d'Omalins.

*Mehleno (Malines).* — S-ro Van Peteghem, rue Notre-Dame.

*Namur.* — S-ro Verbeke, 21, rue du Collège

*Spa.* — S-ro Grosjean, eks-profesoro.

*Verviers.* — S-ro Harold Palmer, 20, Place Verte.

*El « Belga Sonorilo ».*

**Britujo.** — *Greenock* (Skotlando) — Konsulo kaj publ. Esp.-Of., S-ro D. K. Miller, 15, Charles Street.

*Leeds* — Konsulejo: Thoresby Rooms, 10 Park street.

Konsuloj: S-roj: J. A. Woodhead, Newport House.

F. L. G. Maréchal, 12, Eldon Place.

J. H. Beaumont, 19, Leathley Road, Hunslet.

R. Stanciliffe, Central Home, Street Lane.

**Francujo.** — *Ancecy.* — Konsulo de l' grupo: S-ro Boucon.

Ni plezure enpresas tiujn liniojn, kiuj, unufoje plue, montras la intereson kaj gravecon de « Tra la Mondo » por la propagando, por la gelegantoj kaj por la lingvo mem: per ĝia generala kaj moderna karaktero, ĝi ektuŝas ĉiuspecajn ideojn, kiuj ne havas lokon en organoj pure literaturaj aŭ propagandaj kaj devigas, sekve, esprimi tiujn ideojn, ĉu per lerta utiligado de jam ekzistantaj radikoj, ĉu per elpensitaj teknikaj vortoj.

Oni povis rimarki ke, tiom kiom eble, ni evitas la novajn radikojn; aparte kiam kutimaj vortoj ebligas esprimi teknikan ideon. Tio estas necesega por ke Esperanto konservas sian tute specialan karakteron de facileco por ĉiuj.

### Alvoko al ĉiuj Esperantistoj-Astronomiistoj.

S<sup>ro</sup> Félix de Roy (342, Chaussée de Turnhout, Borgerhout (Anvers), Belgique, petas la esperantistojn de ajn lando, kiuj interesigas je starigo de vortaro por Astronomio, bonvoli interrilatigi sin kun li. La alvoko estas atentinda pro du kaŭzoj: Astronomio estas pleje internacia scienco, kaj S<sup>ro</sup> de Roy estas distinga scienculo, membro de astronomiaj Societoj de Belgujo, Anglujo kaj Francujo. Fine, li kunlaboras en nia bonega kunfrato « Belga Sonorilo », kio estas ankoraŭ titolo je nia atento.

*Charenton.* — Konsulo de l' grupo: M. Cuzon, 52, rue de Paris, Le Creusot. — Esp. Konsulejo kaj publika Esperanto-Oficejo, 20, Place Schneider.

*Reims.* — S-ino Gérard Glatigny, 2, rue Pontsardin;

S-ro Dubois, 14, rue de Libergier;

S-ro Grouselle, 35, rue des Consuls.

*Saïgon (Cochinchine).* — Konsulejo de l' grupo en Saïgon.

*Serres (H<sup>es</sup> Alpes).* — Konsulo kaj publ. Esp.-Of., S-ro L. Faucher.

*St Nazaire-s-Loire.* — Konsulo aprobita de l' urbestro, de l' fremdaj konsuloj, de l' komerca estraro, k. t. p.: S-ro R. V. R. Aubin, 97, rue du Croisic.

*Troyes.* — Konsulo de l' grupo: S-ro Doré, konsilanto de l' ekstera komerco, 4, rue Jeanne d'Arc.

**Germanujo.** — *Leipzig.* — Esperantista « informejo » ĉe « Leipziger Verkehrsverein », Kupfergasse, Magazin 20.

*Rim.* — En Germanujo, oni decidis apreni la nomon « informejo » anstataŭ « konsulejo », ĉar oficisto de konsulejo ne estas rajtigita uzi la nomon « konsulo » — *El « Germana Esperantisto ».*

**Hispanujo.** — *Murcie* — Konsulo de l' grupo: S-ro R. Godorniu; adreso: *Esperanto*, Malecon C. Murcia (España).

**Italujo.** — *Roma.* — Esp. Konsulejo, Fotografia Dottarelli, 29, via Belsiana.

**Rusujo.** — *Elisavetpol.* — Konsulo: S-ro M. Krjuĉkov.

**Svisujo.** — *Zurich.* — Konsulo de l' grupo: S-ro Anton Waltisbühl, Bahnhofsstrasse, 46. Havas grandan aliŝejon por Esp. prop. sciigoj.

*Rim.* — Oni estas treege petata sendi ĉiun novan sciigon al S-ro Th. Rousseau, 6, place Carriat, Bourg, France.

### Esperanta Oficejo modela.

Nia kunlaboranto S<sup>ro</sup> Rousseau klarigis kiel, laŭ li, devas funkciadi Esperanta oficejo. Jen kelkaj detaloj pri Esperanto-Agency, fondita de preskaŭ 2 jaroj en Glasgovo (la 2<sup>an</sup> de Feb. 1905), de nia agema amiko G. Douglas Buchanan.

Ĝi celis helpi grupon malgrandan kaj kiu, pro tio, ne havis monon por agema propagando, donante ankaŭ lokon por kunvenoj kaj por ricevi la fremdajn samideanojn.

Tuj li registris oficiale, ĉe la poŝtofico, la nomon Esperanto-Agency, klopodis ĉe librovendisto, por ke li vendu esperantaĵojn kaj metu afiŝojn en siajn fenestrojn, fordonacante al li ĉiujn profitojn, lasante nenian riskon; disdonis *komplimentajn* ekzemplerojn de « The Esperantist » kaj « The British Esperantist » ĉe la ĉefa kafejo de la urbo. Nun li uzas ankaŭ « Tra la Mondo ».

La agentejo korespondadas senĉese por kaj pri Esperanto. Dum 1906 ĝi ricevis pli ol 600 leterojn kaj sendis ĉirkaŭ 1000 (945 ĝis la 26<sup>a</sup> de Nov.); ĉar, komence, la librovendistoj ne konsentis provizi sin per broŝuroj, propagandiloj, k. t. p., la agentejo ĉiam havis da ili; ĝi ricevis abonojn por la Internaciaj revuoj.

Fine, kun la helpo de kelkaj sindonaj klientoj, la agentejo eldonis tre sukcesintan paroladon de S<sup>ro</sup> Coox, el Stirling, kaj kelkajn propagandilojn, zorge, eĉ lukse presitajn diverskolore, kiuj diskonigis la nomon de la Agentejo kune kun tiu de Esperanto, en la tuta mondo; poŝtkarton, vizitkarton, stelformajn presilojn.

Fine, fratoj Buchanan kreis markon Esperantan por Viskio kaj cigaredoj, tio kio ne estis la maleplaj bona rimedo propaganda.

La rezultatoj estas pleje kontentigaj: la libristoj ne plu ridas kiam oni parolas al ili pri esperantaĵoj; la gazetoj estas atente legataj en la kafejo kaj la ilustraĵoj de « Tra la Mondo » scieme rigardataj; multaj personoj, inter kiuj tre ŝatindaj rekrutoj, venis al la Verda Standardo, ekz. D<sup>ro</sup> James Knight, kiu sendis al ni tre interesan artikolon por nia enketo pri edukado, kaj S<sup>ro</sup> Ernest E. Smith, l'energia sek. de l' grupo de Glasgovo; la Skota gazetaro tre favore konsideras Esperanton.

Multobligante, helpante en ĉiuj urboj l' agadon de pli gravaj centraj naciaj oficejoj, tiaj oficejoj, agentejoj, konsulejoj, tre efike agados por la rapida kreskado de nia afero.

# Gazetaro.

Ni transsendas al la jenaj revuoj abonojn akompanatajn de la abonkosto. — Aldoni 10 centimojn por la transsendo de la mendo.

## ESPERANTAJ ORGANOJ.

**Eŝo Esperantista** — Praktika kaj komerca. Ĉe S<sup>o</sup> H. Brühl, Unter den Linden 47 III, Berlin, Deutschland. Jare, 2 markoj.

**Esperanta Ligilo.** — Monata revuo por blinduloj per Esperanta Braille'a sistemo. 3 f. — Ĉe S<sup>o</sup> Cart, 12, Rue Soufflot, Paris.

**Espero Katolika.** — Tute Esperante. Unu N<sup>o</sup> afrankita 0f. 50; Francujo, 4 fr.; alilande 5 fr. Presejo Barbot, 15, r. Etienne Pallu, Tours (France).

**Espero Pacifista.** — Monata organo de l'Esperantista Societo por la Paco. Jara abono 5 frankoj. Sin turni al S<sup>o</sup> Gaston Moch, 26 rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

**Foto-Revuo Internacia.** — Ĉiumonata resumo de Photo-Revue. Jara abono, 5 fr. 1 Numero aparte, 50 cent. Ĉe la « Librairie photographique » Charles Mendel, 118 Rue d'Assas, Paris.

**Juna Esperantisto.** — Tute Esperante. Divastigo de Esperanto ĉe la junularo — 2 fr. 50. — Redakcio: 9, Avenue des Vollandes, Genève (Suisse); Adm. 33, Rue Lacépède, Paris.

**La Revuo.** — Internacia monata literatura gazeto, kun konstanta kunlaborado de D<sup>ro</sup> Zamenhof. — ĉe Hachette k. K., 79 Boulevard St-Germain. Paris. — Jare, Francujo: Fr. 6, ceteraj landoj: Fr. 7.

**Lingvo Internacia.** — Duonmonata Esperanta revuo. Fondita en 1895. Literatura kaj propaganda tute en Esperanto. Abono 7,50 fr. ĉiulande. Unu numero 0 f. 50. Abono estas akceptata de l' komencigo de ĉiu monato.

**Unua Paŝo.** — Monata bulgara gazeto en Esperanto. Pritraktas speciale bulgaraĵojn: morojn, literaturon, k. t. p.: jare, 3 fr.; duonjare, 2 fr. — Ĉe S<sup>o</sup> S. Petkov, 26, Strato San-Stefano, Sofia, Bulgarie.

## PROPAGANDAJ ORGANOJ.

**Amerika Esperantisto:** Gazeto por la Lingvo Esperanto en la Unuigitaj Statoj de Ameriko, angle kaj Esperante. Bele presata. Jara abono: 1 dolaro. Adreso: L'Amerika Esperantisto, Oklahoma City, U. S. A.

**Antaŭen Esperantistoj.** — Hispane kaj Esperante. — Organo de la Perua esperantista societo — 3 fr. — Administranto, Antonio Alvarado, apoteko del Teatro. Calle Lártiga, Lima (Peruo).

**La Belga Sonorilo.** — Bonega malnova propaganda revuo: Esperante, france, flandre. Sciigoj — Literaturo — Scienco.

Eliras ĉiumonate. Abono: 4 fr. jare. Kolektoj de antaŭaj jaroj: 6 fr. Ĉe J. Coox, Duffel, (Belgique).

**The British Esperantist.** — Oficiala monata organo de la Brita Esperantista Asocio; 20 paĝoj da novaĵoj, k. c., anglo-Esperante, kaj da literaturo tute en Esperanto. Jare 4 fr. — Ĉe la Sekretario de la B. E. A., 13, Arundel Street, Strand, London.

**Centrameriko Esperantista.** — Hispane kaj Esperante. F. R. G. Abril, 8<sup>a</sup> Avenida Sur 11, Canton Liberdad, Guatemala, Ameriko.

**L'Espérantiste.** — France kaj Esperante redaktata, oficiala revuo de la S f p E: 24 paĝoj da teksto, 8 paĝoj da kovrililo kun multaj sciigoj pri la grupoj kaj ĉiuspecaj esperantistaj verkoj. Abono: Francujo 3 fr.; alilande: 3,50 fr. Administracio: Louviers, (Eure), France.

**Esperantisten.** — Svede kaj Esperante. Organo de la Svedaj Esperantistoj, fondita de la Stockolma Klubo. Tre subteninda por helpi esperantistan movadon en Svedujo. Ĉe P. Ahlberg, 37, Surbrunnsgatan, Stockholm. 3 fr. 75 ĉiujare; aparta N<sup>o</sup>: 35 cent.

**Esperanto.** — Hungare kaj Esperante. Scienca kaj literatura. 4 fr. ĉiulande. Ĉe S<sup>o</sup> Marich Agoston, Papnövelde-Uteza 6, Budapest, IV. (Hungarujo).

**Esperanto-Journal.** — France kaj Esperante, 24 numeroj, Francujo kaj Svisujo: 3 fr.; aliaj landoj: 3 fr. 75. Pago per poŝtmarkoj je 10 % de kalkulo. Adm.: P. R. Central Genève (Suisse).

**Germana Esperantisto.** — Organo de diversaj germanaj grupoj esper-

antistaj (ĉiumonate) Redaktata germane kaj Esperante. JARABONO 3 f. 75 Administracio kaj Redakcio: Esperanto Verlag, Möller & Borel, Berlin, S., 95, Prinzenstrasse.

**Japana Esperantisto.** — Monata, Japane kaj Esperante, — kun ilustraĵoj. Jarabono 60 senoj — N<sup>o</sup> 14, 3 ĉome, Jurakō, Kozimacik, Tokio

**La Pioniro.** — Ĵurnalo Esperanta India. Eldonata de la Kolar Gold Field Esperanto Club. Monata abono: kvar pencoj. Red. kaj Adm.: Hon<sup>a</sup> Sek<sup>a</sup> de la klubo esperantista de la K. G. F. Marikuppam, Mysore State, South India.

**Pola Esperantisto.** — Pole kaj Esperante. — 2 fr. Akademicka 26, Lemberg, Galicio.

**Ruslanda Esperantisto.** — Ĉiumonata organo de la S-to « Espero »; Esperante kaj ruse — Diversspeca, interesa kaj bonstila literatura materialo: artikoloj pri la problemoj de la lingvo internacia kaj pri Esperanto; vasta kroniko de Esperantista movado (propraj korespondantoj kaj bibliografio; novaj famaj beletristikaj, versaĵoj kaj mult. al — Detalaj prospektoj riceveblaj, senpage. — Jara abonpago kune kun membrigo en la S-to « Espero » — 3 rubloj (7 fr. 50 cent.). Adreso: Ruslando, St Peterburgo, B. Podjačeskaja, 24, al la S-to « Espero. »

**Suno Hispana.** — Hispane kaj Esperante. Abono 3 fr. Administracio kaj redakcio: Avellanar, 11, presejo — Valencia (Espana).

**Svisa Espero.** — France kaj Esperante — 2 fr. — Ĉe Sinjoro Renard, 6, Rue du Vieux Collège, Genève.

## ESPERANTEMJ ORGANOJ.

**Les Annales politiques et littéraires.** — Jare: 10 f. — 15, rue St-Georges, Paris. Abono 10 fojojn repagita per la profitoj de l' « Carnet de la mutualité des Annales » (Libreto de l' reciproka apogo de Annales).

**Le Cycliste.** — Revuo monata de ciklotekniko kaj de turismo. — D<sup>ro</sup>: P. de Vivie, 5, Rue de la Préfecture, Saint-Etienne. — Abono: Francujo 1 fr. 80, alilande 2 fr. 40. — Ĉiuj informoj pri la bicikloj kun meĥanismo por ŝanĝi la rapidumojn kaj pri higieno ciklista.

**La Gazette de Lausanne.** — Journal politique et littéraire. Organe de 1<sup>er</sup> ordre. Grand format. Fondée en 1798. Paraissant six fois par semaine. — *La Gazette de Lausanne* est un des journaux les plus appréciés et les plus répandus de la Suisse et de l'étranger. Elle offre à ses lecteurs un ensemble de renseignements complets, soit sur les affaires du pays, soit sur la politique étrangère. Elle a des correspondants dans les principales villes de la Suisse. De même à Paris, Bruxelles, Rome, Berlin, etc., d'où elle reçoit des lettres périodiques. — *La Gazette de Lausanne* a pour collaborateurs les meilleurs écrivains de la Suisse romande. Elle publie des chroniques artistiques, musicales, scientifiques et militaires. Feuilles choisies. Service télégraphique étendu.

**De Luthof.** — Ĉiumonata multilustrata revuo. — Ĝi ekzistas de 5 jaroj, kaj estas la plej bela kaj la plej malkara el la flandraj ĵurnaloj.

Jara abono: 2 frankoj.

Sin turni al la presisto de *Tra la Mondo*, Bruĝo, Belglando.

**La plume Sténographique de France.** — Universala revuo ilustrata de Stenografio kaj Daktilografio — D<sup>ro</sup>: L. P. Canet, Adm., 15, Rue Manigne, Linoges. — Ĉiulandaj sciigoj pri ĉio rilatanta la rapidan skribadon kaj la skribmaŝinojn; ĉiusistema stenografio, literatura kaj historia fako, ilustraĵoj, ludoj, k. t. p. **Petu specimenon.**

## Nekomercaj anoncetoj.

25. Mi sendos cent malsimilajn poŝtmarkojn el francaj kaj neerlandaj kolonioj al tiuj, kiuj sendos al mi cent malsimilajn poŝtmarkojn el anglaj kolonioj, prefere malnovajn. Fize, au Pastissou à Béziers, France.

26. **Paŭlo Keilich**, Cöln-Lindenthal, Gleuelerstrasse 135 (*Germanujo*) deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun gesamideanoj de ĉiuj landoj. Li sendas markojn germanajn.

## Familio Esperantista.

*Mortoj.* — D<sup>ro</sup> E. T. Whitaker, el Shrewsbury, fervora propagandisto, F<sup>no</sup> Demézil, Bordeaux, fidela partoprenantino en niaj konkursoj.

## Malgranda korespondado.

S<sup>ro</sup> **Th. Th.**, Kopenhago (*Danujo*). — Mi estus danka al vi sendi kiel eble plej frue la artikolojn esperigitajn, de instruistoj.

**Al kelkaj, kiuj ne ricevis iun numeron de « Tra la Mondo. »** — Bonvolu legi la kovrilan sciigon pri poŝtaj perdoj.

S-roj **E. Bacquet** (*Francujo*); **J. H. Salomon** (*Holandujo*); **Wasilewski** (*Polujo*). — Plej bonajn dankojn pro viaj projektoj.

## ILUSTRITAJ POŝKARTOJ PROPAGANDAJ.

kun belaj vidaĵoj eltiritaj de

## « TRA LA MONDO »

La serio (6 kartoj), afr.: 0 fr. 40 c.

5 serioj (30 k.), afr.: 1 fr. 50 c.

10 serioj (60 k.), afr.: 2 fr. 50 c.

15 serioj (90 k.), afr.: 3 fr. 75 c.

**Rekomendo: 0 f. 10 c. aŭ 0 f. 25 c. plue.**

*Pageblaj poŝtmarke aŭ monopapere.*